


eLIBRO

*Valdemar Langlet*

# Vojaĝimpresoj



INKO



Valdemar Langlet  
**VOJAĜIMPRESOJ**  
(*el Lingvo Internacia*)

eLIBRO

Arangis: Franko Luin

**ISBN 91-7303-073-2**

[inko@tyreso.nu](mailto:inko@tyreso.nu)

<http://www.tyreso.nu/inko>

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO

JUNIO 2001 / FEBRUARO 2002

## Enkonduko

**E**n 1895 du studentoj ĉe la universitato de Upsalo faris longan vojaĝon tra Eŭropo. En la provnumero de *Lingvo Internacia*, decembro 1895, aperis jena noto pri tiu vojaĝo:

”En pasinta somero la estro de la Upsala Klubo Esperantista, V. Langlet kaj lia amiko E. Etzel faris grandan kaj tre interesantan vojaĝon tra Rusujo, Turkujo, Rumanujo, Aŭstro-Hungarujo kaj Germanujo. La vojaĝo donis tiel bonajn rezultatojn por nia lingvo, ke ni varmege rekomendas al la amikoj de niaj aferoj tiun ĉi novan manieron por propagando de nia lingvo. Krom tio la vojaĝo pruvis praktike, ke nia lingvo tute taŭgas por buŝaj interkomunikiĝoj de la diversnacioj, ĉar en daŭro de la vojaĝo s-roj Langlet kaj Etzel tute libere parolis kun la rusoj sole en la lingvo Esperanto pri la plej diversaj objektoj. Precipe rimarkinda estas la fakto, ke s-ro Etzel ellernis la lingvon *en daŭro de la vojaĝo mem*, t. e. en daŭro de kelkaj tagoj, kaj poste uzadis ĝin kun plena sukceso.”

En la sama numero aperis la unua artikolo pri tiu vojaĝo. En enciklopediaj fontoj tiu vojaĝo estas menciita kiel la unua grandskala vojaĝo, en kiu esperanto estis praktike uzata.

Valdemar Langlet (1872–1960) faris post tio multajn aliajn longajn vojaĝojn. Pri kelkaj aperis libroj, kiujn li skribis en la sveda lingvo, sed ni trovas spurojn pri ili ankaŭ en *Lingvo Internacia*, kies unua redaktoro li estis, kune kun Vladimir Gernet el Odeso.

En ĉi tiu kajero mi kolektis liajn "vojaĝimpresojn" el la unuaj jarkolektoj de *Lingvo Internacia*. La lingvaĵo estas lia propra, ankoraŭ ne tre vortriĉa esperanto; mi ŝanĝis nur evidentajn preserarojn.

Mi aldonas en mia propra traduko ĉapitron el lia svedlingva libro *Surĉevale tra Ruslando* (Till häst genom Ryssland) el la jaro 1898, en kiu li priskribas viziton ĉe la rusa verkisto Lev Tolstoj.

Valdemar Langlet, frua esperanto-pioniro, estis frua en multaj rilatoj. En al jaro 1891 li kunfondis la duan esperanto-klubon en la mondo — tiun en la sveda universitata urbo Upsalo, kies prezidanto li estis inter 1892 kaj 1899; li fariĝis en 1895 redaktoro de *Lingvo Internacia*, en 1906 la unua prezidanto de Sveda Esperanto-Societo (poste Federacio), okazigis en 1899 la unuan esperanto-geedziĝon (kun Signe Blomberg el Turku, Finnlando). Ankaŭ lia geedziĝa vojaĝo estis neordinara, ĉar ĝi iris al la tiam malfacile atingebla Samarkando, daŭris monatojn kaj rezultigis plian vojaĝlibron. Profesie li estis dum multaj jaroj ĵurnalisto, redaktoro, rektoro pri la sveda lingvo en Budapeŝto, kaj alio.

En Hungario li dum la jaroj 1944 kaj 1945 gvidis kun sia dua edzino Nina (filino de N. A. Borovko, fama rusa esperantisto) vastskalan organizon je la nomo de Sveda Ruĝa Kruco, kiu helpis al dekmiloj da hungaroj, judoj kaj nejudoj, saviĝi de la naziaj persekutoj.

Kiam Valdemar Langlet mortis en la jaro 1960, li daŭre estis esperantisto kaj membro de Sveda Esperanto-Federacio.

*Franko Luin*

## Impresoj de svedoj, vojaĝantaj en Rusujo

*Lingvo Internacia, provnumero, decembro 1895*

**V**i estas tre feliĉa homo, kiu povas vojaĝi. Sed en Rusujo! Ĉe niaj heredaj malamikoj! Mi vere timas, ke mi Vin neniam revidos!” — Tiel, proksimume, skribis al mi bona amiko, respondante la leteron, en kiu mi anoncis al li mian decidon veturi en Rusujon. Mi ridis, legante la infanajn liniojn. Mi ne havis tian timon. Tamen, mi devas konfesi, — se mi sincere parolas, — ke mi ne iris al la rusoj kiel al amikoj; mi iris Rusujon por ekvidi, mi pensis, popolon, kiu dank’ al ĝia ankoraŭ iom barbara kaj haltigita stato devas esti interesanta por mi, okcidenta eŭropeano kaj, kvazaŭ ano de unu el la plej kultivitaj nacioj de l’mondo.

Kaj reveninte hejmen, kiun mi trovis prava, min mem, aŭ mian amikon, aŭ, eble, neniun el ambaŭ? Vi vidos.

Mi konis en la tuta Rusujo ne pli ol du, eble tri personojn, kaj la lingvo rusa estis al mi, kaj estas ankoraŭ nekonata kampo. Mia kunvojaĝanto estis — se eble — preskaŭ pli nekonata. Kiel do ekriski traveturi landon fremdan, kies loĝantojn, lingvon kaj ĉiujn rilatojn mi tute ne konas? Sed la juneco estas esperanta, kaj poste: ni ambaŭ estas *esperantistoj*. Jen, vere, la unua igilo viziti Rusujon. Unu el la du-tri iom al mi konataj rusoj, ankaŭ esperantisto, invitis min fari viziton en Jalta, la ”faŝonabla” urbeto sur *Krim*, loĝi ĉe li kaj ricevi de li ĉion, kion mi bezonas (ah, mia malbone profetanta amiko! Kie estas viaj ”heredaj malamikoj”? — tre afablaj, ŝajnas al

mi!). Mi scis ankaŭ, ke preskaŭ en ĉiu rusa urbo ekzistas kelkaj esperantistoj, kiuj eble min helpus. Ĉu mi estis prava en tiu espero? Vi vidos.

Kaj ni elveturis; mi tra Finnuloj velocipede, tra la plej bela, plej ĉarma lando, ĉe la plej "lojala" popolo; mia amiko poste per vaporŝipo rekte al Peterburgo. Tie ni renkontis unu la alian.

Peterburgo en junio ne estas Peterburgo. Oni ĝin diris al mi kaj mi mem povis ĝin kompreni. Sed ni ne povis resti en la urbo ĝis ĝi denove fariĝos Peterburgo; ni restis 8 tagojn — kaj estis ravitaj. Kvankam Peterburgo ne povas egaliĝi kun nia ĉefurbo rilate la situacio, la natura beleco kaj la artaj konstruaĵoj, tamen ĝi ŝajnis al ni tre interesa kaj, parte, tre bela. Speciale nin interesis la preĝejoj kaj la religiaj ceremonioj, poste la reĝa palaco ("palaco de vintro"), la muzeoj, la Gostinnij Dvor, la bazaro kaj la "izvoŝĉikoj" (veturigistoj), kies strangaj figuroj kaj malmultepezaj, rapidaj veturiloj al ni multe plaĉis.

En Peterburgo mi faris la unuan sperton en esperanta parolado, renkontinte unu *eston*, sinjoron W. Waher, kiu tute ne scias aliajn lingvojn krom rusa kaj esta, de kiuj ambaŭ mi ne scis eĉ vorton. Ni tamen fervore paroladis en la lingvo Esperanto, kvankam ni ambaŭ nun la unua fojo havis okazon paroli en ĝi kun persono de alia nacio.

Sed en Moskvo mi havis pli gravan sperton. Tie mi en daŭro de la tuta tago estis kune kun s-ro Puĉkovski, kiu tute libere uzas nian lingvon. Nia kunestado estis por mi tre agrabla. Tie ankaŭ mi konatiĝis kun kelkaj aliaj adeptoj de la lingvo internacia kaj kompreneble ni uzadis sole nian komunan lingvon. La moskvaj amikoj montris al ni ĉion vidindan en la urbo kaj ni estis efektive ravitaj de la amasoj da antikvaj kon-

struaĵoj tre malordinaraj, strangaj kaj belaj, — precipe, kompreneble, la Kreml.

El Moskvo la fervoja vagonaro nin kondukis dum tri tagoj kaj tri noktoj trans la grandega rusa stepo ĝis Sevastopolo. La vojo estas longa kaj ne tre bela, tamen interesa, se oni havas la okulojn malfermitajn por la lum-efektoj, kiujn efikas en la stepa pejzaĝo, la suno ĉe ĝia leviĝo kaj malleviĝo, la luno, la steloj, kaj por la karakteristikaj diferencoj inter la homoj, kiuj tago post tago aperas, malaperas antaŭ ili.

En Sevastopolo ni restis du tagojn, vidis la vidindaĵojn en kaj ĉirkaŭ la urbo kaj forveturis Jalton en poŝta veturilo. La vojo kondukas super la altaj montoj al "Bajdarskij vorota" (Bajdara pordego), kie ni restis dum la nokto, kaj matene, tre frue, ni faris la mirinde belan vojon el tiu ĉi loko al Jalto. El Jalto, el tiu ĉi beleta urbeto, kie nin regalis kun neniam laciĝanta gastameco nia amiko, la fervora esperantisto, d-ro Ostrovski, ni faris kelkajn piediradojn kaj veturadojn al la plej rimarkindaj lokoj de l'suda Krimo: Baĥĉi-Saraj, Ĉatir-Dag, Aluŝta, Alupka, Aj-Petri k. c. Vortoj ne povas esprimi nian raven, vidante tiun belecon de l'naturo kaj bonecon de l'homoj, kiun montris al ni nia estado en Krim; ankoraŭ nun, kiam ni parolas pri ĝi, okazas ke la koro bategas, la okulo ploretas kaj la voĉo engorĝiĝas ...

El Jalto, la vaporŝipo Miĥail nin forportis preter la Krima montaro, nun laste vidita, ĝis Odeso. Se ni en aliaj lokoj vidis pli multe, ol en Odeso, tie ĉi tamen pli klare ol alie, esceptinte Jalton, ekbrilis por ni la karaktero de l'rusoj kaj rusinoj en ĝiaj la plej bonaj ecoj: senfina amindeco, senlima bonkoreco, mirinda gastameco, estimeginda profundeco de la pensoj kaj sentoj, enviinda entuziasmo por altaj, idealaj celoj. Neniam

eliros el la koro la memoro pri tiuj tagoj, tagoj de la plej granda, plej pura ĝojo. La voko de niaj animoj kaj de niaj gorĝoj estis: *vivu la rusoj kaj vivu Esperanto!* Ke tiu voko povu esti aŭdita de ĉiuj rusaj oreloj!

Kie do estas, mia sveda amiko, viaj "heredaj malamikoj"? — Malaperis kun la nebuloj de antikvaj mallumaj tempoj! Neniam ili revenu!



## El Odeso ĝis Konstantinopolo

*Lingvo Internacia, marto 1896*

*En Odeso. Agrabla ŝipo. — Sur Maro Nigra. — La verda radio.  
Ventego sur la maro. — Bosporo kaj Konstantinopolo.*

Odeso, — Adessa diras la rusoj, — kuŝas apud golfo de Maro Nigra. La urbo sin levas terase de la bordo, tiel ke oni havas el ĝiaj pli altaj partoj la plej ĉarman vidaĵon super la bordo kaj haveno tie malsupre kaj super la briletanta akvo de l'golfo. La haveno cetere estas la plej granda vidindaĵo de Odeso. Du grandegaj ondrompiloj (fr. "brise-lames" angl. "breakwater") etendas siajn longajn mallarĝajn brakojn en la golfon kaj ĉirkaŭprenas la akvosupraĵon, kie ŝipoj el la kvar flankoj de l'mondo malvastiĝas je l'placo. Teruraj grandeguloj, konstruitaj tute el fero, kuŝas en seninterrompaj vicoj laŭlonge la surbordo kaj plenigas sian internon per miloj de sakoj da greno el la fruktoportaj kampoj de Suda Rusujo. Nudpiedaj havenaj portistoj, tre malbone estimindaj, vestitaj en disŝirita ĉemizo kaj trua pantalono, aŭ eĉ nur en unu el tiuj du, portas la sakon post sako el plenŝargitaj vagonoj kaj malplenigas ilin en la nesatigeblan faŭkon de l'ŝipa kaverno. La ĉenoj de vaporkranoj grincas kaj krakas, ŝipsubestroj krias kaj ĵuras en dekkvin lingvoj, lokomotivoj sur la surbordo siblas, muĝas kaj fajfas, estas vivo kaj movo en ĉio, kaj oni preskaŭ sentas kapturnadon, rigardante ĝin. — Tiel daŭriĝas dum la

tuta tago, sed iom antaŭ la 8-a horo vespere finiĝas ĉia laboro, la havenistoj foriras por trinki glason da teo aŭ da brando kaj dormi en la malpuraj, malbonodoraj hunduoj en mallarĝaj kaj malpuraj stratetoj ĉe la haveno; ĉiuj nerajtigitoj estas forigataj el la fermita regiono de l'haveno, la kradoj de la pordegoj ŝlosataj, ĉio fariĝas silenta kaj nenia sono estas aŭdata krom la plaŭdado de l'ondoj kaj la mezuraj paŝoj de l'havenaj gardistoj, kiuj laŭ sia devo observas, ke neniu eliru aŭ eniru dum la nokto.

Ni venis, mi kaj mia kolego en la vojaĝo tra Rusujo, el Sevastopolo Odeson, intencante resti en tiu ĉi urbo nur du tagojn ĉe kelkaj tie loĝantaj esperantistoj. En ilia societo ni vidis ĉion, kion da intereso havas la urbo, la antaŭ nelonge konstruitan neordinare belan kaj imponantan teatron, kie ni aŭskultis la tre amatan en Rusujo operon "Vivo por la Car" de *Glinka*, — la Aleksanderparkon, kiu kuŝas apud la ruinoj de malnova fortikaĵo, kaj fine — grandan kaj malgrandan *Fontanojn*, — la antaŭurbojn de Odeso apud la bordo mem de l'Maro Nigra kun bonaj lokoj por banado kaj kun beletaj somer-loĝejoj, enmetitaj inter la plej freŝa verdaĵo. — Kaj nun ni devis diri adiaŭ al niaj karaj esperantistaj amikoj kaj samfoje ankaŭ forlasi la landon, en kiu ni pasigis kvin semajnojn, tiel riĉajn de belaj kaj neforigeblaj impresoj de la plej interesa lando kaj de popolo, kiu per sana kaj natura gajeco, per malordinare afableca karaktero, per la tute nemerita kaj tial ankoraŭ pli dankinda boneco kaj gastameco rilate nin fremdulojn tute al militis al si niajn korojn.

Nia vojo estis al Konstantinopolo kaj, ĉar la ordinaraj pasaĝeraj vaporŝipoj ne foriradis en la konvena por ni tempo, ni konsentis kun la kapitano de angla komerca ŝipo *Fernlands*,

ke ni iru kun li. Ni alvenis la vaporŝipon en tute ĝusta tempo: precize en 4:a horo ni devis veni, estis la kapitano dirinta.

Estis neordinara trankvileco sur la ŝipo; neniu homo aperis, krom la ŝtewarto kaj iu havenisto, kiu fermis la "truon" de la granda ŝipa kaverno, — kaj fine la subkapitano, kiu, videble atakata de malgajaj pensoj, iradis sur la ferdeko. Ĝi ne estis mirinda: ni baldaŭ ekaŭdis, ke la kapitano kuŝis malsobra en sia kajuto, ke tri kvaronoj de la ŝipanaro forkuris kaj ke la kvara sekvis la ekzemplon de sia estro.

Post mallonga tempo alvenas du havenaj soldatoj, tiregantaj individuon, kiun ili trovis duonvivan pro malsobraĵo en ia drinkejo; li akceptas piedpuŝon de l'subkapitano kaj puŝiĝas sub la ferdekon. Alia patrolo trenas kun si paron da "knaboj", kiuj "mit aller Gewalt" volas aranĝi batiĝadon inter si kaj kun la gardantoj; ili tamen estas venkataj kaj alportataj ŝipon. — Kaj tiel iom post iom kolektiĝas la konfidinda anaro, kiu devos nin konduki ĝis Konstantinopolo.

Tiam subite oni aŭdas laŭtan sonon, kvazaŭ revolveran ekpafon, sekvitan de infernaj kriegoj el l'internaĵo de l'ŝipo, kaj ĉie estas krio kaj bruo; post kelkaj momentoj aperas viro, kureganta supren laŭ la ŝtuparo de l'kajuto, kun sangita vizaĝo, kaj krias, ke "the captain" pafis, volante mortigi lin, kaj batis lin en frunton per la revolvera tenilo. Post li venas kelkaj sobraj (relative) viroj, kiuj momente ligas la manojn de l'unua per fortika ŝnurego, dum li krias laŭforte, kaj la subkapitano klarigas, ke la homo estis aroganta kontraŭ la ŝipesstro, ke tiu ĉi daŭrigas esti mort-malsobra kaj ke la ŝipo povos foriri nur en la sekvanta tago.

Oni sendube pardonas, ke ni ne trovis oportuna konfidi

niajn karajn vivojn al "Ternlands" kaj al ĝia nobla anaro, sed prokrastis la foriron. En la sekvanta tago troviĝis alia angla ŝipestro, kiu ne rifuzis preni nin kun si, sed kiam li klarigis sincere kaj kavalire (kiel "gentleman"), ke li ankaŭ amas ĵus antaŭ la forveturo preni tute "ordan pleniĝon", ni dankis kaj restis en Odeso dum du agrablaj tagoj, ĉe niaj esperantistaj amikoj, ĝis ni povis forveturi kun la rusa pasaĝira vaporŝipo *Jekaterina II*.

La bonaj rusoj sekvis nin ĝis la ŝipo mem, por ke oni povu en la lastaj momentoj interŝanĝi kelkajn korajn vortojn de adiaŭ. Estis maldolĉe disŝiri nun, eble por ĉiam, la firmajn, fortajn ligilojn de amikiĝo, kiu kvankam ligiĝis antaŭ nur kelkaj tagoj, tamen dum la ĉiutaga kunestado kreskis ĉiam, pli kaj pli forta dank' al gajaj kolektiĝoj kaj seriozaj interŝanĝoj de penso pri la plej gravaj demandoj de l'vivo, — kaj kiu nun ligis nin tiel same firme, kvazaŭ se ni estus amikoj de infaneco, ni, du svedoj, kaj tiuj noblanimaj infanoj el nia "heredmalamika" lando. — Sed la vaporŝipa sonorilo sonas memoriĝante; laŭ la bona rusa kutimo, kiu estas tiel senfine pli bela kaj esprimanta, ol la malvarmaj manpremoj de niaj kunlandanoj, ni interŝanĝas kison kaj ĉirkaŭprenon kun ĉiu el niaj amikoj, rapidas sur la ŝipon, vane dezirante kaŝi unu al la alia nian tuŝadon, kvazaŭ se la larmoj, aperante en niaj okuloj, estus io, kion ni devus honti. La vaporŝipa ŝtraŭbo komencas labori, sed el la malgranda aro sur la bordo ni aŭdas ankoraŭ multefoje ripetatan koran "vivu feliĉa, bonan vojaĝon!" kaj la blankaj tukoj, moviĝante, donis al ni la lastan amikan adiaŭon el la tero de Rusujo.

\* \*

\*


Baldaŭ la rusa tero malaperas el niaj okuloj. Ĉirkaŭe ni vidas nur ĉielon kaj maron. Estas vespero, la suno baldaŭ trempos sian fajran vizaĝon en la maron, kiu apenaŭ krispigata de la venteto permesas al *Jekaterina II* antaŭeniĝi majeste kaj grandioze, memorigante ĝian gloran samnomulinon. La delfenoj, kiuj dum la tago gaje saltas ĉirkaŭ la ŝipo kaj iafoje faras verajn saltomortalojn, — eĉ ili nun laciĝis je sia ludo aŭ fornaĝis en alian lokon. Neniaj birdoj flugas nun super la larĝa akvo, kiu estus dezerta kaj malgaja, se la ruĝaj radioj de l'vespera suno ne briletus kontraŭ la malgrandaj ondetoj, donante koloron, brilon, vivon al ĉio —

*"Blovis favora venteto, kaj ondo purpurokolora  
Forte kriegis ĉe kilo de ŝipo antaŭeniranta"*

— neniam al mi ŝajnis la pentranta priskribo de Homero pli vera, pli naturfidela, ol nun. Orbrilaj kaj "purpurkoloraj" kaj violetbluaj estas la ondoj kaj la ŝipo kuras antaŭen senhalte, kvankam movata per alia forto, ol tiu, kiu en tempoj de l'poeto-patro movis la "rapide antaŭenkurantajn" ŝipojn.

Sur la ferdeko kantas blinda kantisto iajn melankoliajn malgrandrusajn popolkantojn, akompanante ilin per malgajaj agordoj sur malbona citro. Maljuna turko en larĝa turbano, du krimaj tataroj en naciaj kostumoj kaj unu rusa studento en sia malbela uniformo sidas kaj aŭskultas distre, ĝis subite al unu el la tataroj venas ideo: — li iras al la blindulo kaj igas lin ekludi vivan, delogantan, preskaŭ petolan melodion kaj kune kun la kolego li improvizas gajan dancon el la hejmaj montoj, por granda koleriĝo de l'maljuna turko, kiu ne povas remetiĝi en sian antaŭan olimpian trankvilon, antaŭ ol la du dancantoj, ambaŭ lacigitaj, malleviĝas sub la ferdekon sur ŝnuregaro.


Sed la suna vizaĝo jam tuŝis per sia malsupra parto la supraĵon de l'maro; rapide ĝi malleviĝas pli kaj pli; nun restas nur mallarĝa rando, or-ruĝa strio, brilanta punkto, kaj .... ĉu ĝi estis trompo de okuloj? aŭ ĉu mi ne vidis tute klare, ke en la sama momento, kiam la lasta punkto de l'suno ekestingiĝis, ekfulmis fajrereto, malgranda kaj momenta sed intensive hel-verda? Ĉu — efektive mi vidis la "verdan radion", pri kiu oni diras, ke ĝi aperas antaŭ la atenta rigardanto, kiam li vidas la sunon, malleviĝintan sennebule en trankvilan, senmovan supraĵon de akvo? Mi estis preskaŭ certa, ke ĝi estas imago. Sed post kelkaj minutoj venis al mi mia kunvojaĝanto el alia parto de l'ŝipo: "Mi vidis la verdan radion!" ekkriis li tuj, ekvidinte min. "Jes, ankaŭ mi", mi respondas, "kaj tial ĝia ekzistado, atestita de du kredindaj atestantoj, povas esti rigardata kiel senduba". Sed la klarigadon de l'fenomeno mi lasas al ia pli



BOSPORO

saĝa cerbo. Eble oni ĝin trovos en tio, ke la lasta radio de l'suno atingas niajn okulojn, rompita per la verda akvo de l'maro.

Kaj la krepusko sin mallevas super nin, — la mallonga suda krepusko, kiu tiel rapide fariĝas nokto; kaj la steloj ekbruliĝas



KONSTANINOPOLO — BOSPORO.

sur la firmamento, — ne kiel en niaj lumaj nordaj vesperoj de somero, sed ĉiuj samfoje, kvazaŭ per ia sorĉo.

Kaj jen, kiam la fajra globo de l'suno malleviĝis, la luno sin levias el la maro. Tuj fulmas la ondoj, kiel fluanta arĝento, la steloj brilas flamante, la malfortaj agordoj de l'citro ĉe sipanaro ekmortas, kaj la nokto estas varmeta kaj dolĉa, kiel nokto en la paradizo. Kiel povi dormi, kiel sin enŝlosi en malaeurma, sufoka ĉambreto sub la ferdeko! Ho vi, ĉarma Nigra Maro, ĝin nun tie kuŝas tiel belega, tiel paca, plena da trankvilo kaj plaĉo! Kiel do terura, timinda vi estas en via furio-

zo, kiom multajn kilojn vi rompis, kiom multajn hominfanojn, plenajn da vivo kaj sano kaj kuraĝo vi luliluis en la lastan dormon! Unu fojon, — nur unu fojon mi vin vidis en via sovaĝa majesto; vi turis ondojn, altajn kiel domoj, kaj malfermis faŭkegojn tiel profundajn, ke oni kredis vidi vian fundon; tie malsupre estis akvo lumante verda, brilanta kiel smeraldo, kun minaca griznigra nuanco, sed la kombiloj de l'ondo estis blankaj pro bolanta ŝaŭmo, estis purpure ruĝaj kaj flavruĝaj per vualitaj radioj de nebula vespersuno. Kaj suprenmalsupren, supren-malsupren sur viaj montoj kaj en viaj valoj balancis sin malbona netaŭga floso kun kvar, kvin malfeliĉuloj, kiuj senĉese dronadis en viaj akvamasoj por en la sekvanta momento denove elnaĝi kaj post kelkaj sekundoj de turmentega atendo denove esti dronigataj de la sekvanta atakanta ondego; mi mem staris sur tiu floso kaj en la plej kruelaj turmentoj de timigo pro la minacanta morto kroĉis min krampe ĉe la mizera bastoneto, kiu prezentis maston, sed — — ĝi estis en la pensoj antaŭ la grandegula pentraĵo de Ajvazovski: "Ventego sur Maro Nigra" en la peterburga Ermitaĝo.

\* \*

\*

Imagu, mia leganto, ke vi staras apud la enira pordo de la sorĉa lando de viaj infanaj sonĝoj, lokita per ĉiuj mirindaj estaĵoj kaj strangaj figuroj, kiujn kreis via infana fantazio, kaj plenigita per konstruaĵoj koloritaj de la plej belaj nuancoj de l'ĉielarko, ornamitaj per diamantoj kaj rubinoj, per safiroj kaj smeraldoj, — per tiuj aeraj palacoj, kiujn vi iam scis konstrui, — kaj vi povos iel kompreni miajn sentojn en la bola julia mateno, kiam *Jekaterina II* eniris, en la buŝon de l'Bosporo. La



milfoje ŝanĝiĝantaj diversaj pentraĵoj el "Mil kaj unu nokto", la brilaj figuroj, per kiuj la viva fantazio scias plenigi la fabelan mondon, la historio de l'Oriento, nun ĉio preteriris antaŭ miaj internaj okuloj kaj mi duone miris, ke la *Simplegadoj*\*) ne frakasis la preterkurantan ŝipon en sia ŝtona ĉirkaŭpreno, kiel en antikvaj tempoj, sed afable restis sur siaj placoj kaj permesis al Jekaterina libere foriri.

Ĉu bezone diri, ke la efektivaĵo baldaŭ min vekis el miaj sonĝoj? Bosporo ne apartenas al ia fabela mondo kaj Konstantinopolo ankaŭ ne. Ili estas nurnudaj efektivaĵoj, sed kiaj efektivaĵoj! En oftaj kurbiĝoj rampas la mallarĝa akvo inter altaj krutaj bordoj ĝis la Marmora Lago. La azia bordo estas kovrita per viva verdaĵo, el kiu tie kaj tie elrigardas blindigante blanka konstruaĵo. Sur la ambaŭ flankoj la du bordoj randiĝas apud la akvo per pitoreskaj domoj, unu ne simila al alia. Jen somerloĝejoj de fremda ambasadoro, jen kelkaj grekaj kaj armenaj vilaĝoj, jen la sultanaj palacoj kaj moskeoj, pureblankaj, kiel nur la propraj konstruaĵoj de l'Grandsinjoro mem havas la rajton esti.

Apud *Kara Hissar* kaj *Anadoli Hissar*, — la ĉarmaj ruinoj de l' Konstantinaj fortikaĵoj — ni pasas la lastan kurbiĝon de Bosporo, kaj — "*La sultanino de l'Bosporo*" kuŝas antaŭ niaj okuloj. — Maldekstre *Skutari*, la Azia parto, kun la en malproksimo bluanta Azia *Olimpo* kiel fundo, dekstre — *Pera* kaj *Galata*, eŭropaj partoj, kun la stranga pitoreska *turo de Galata*, kun *Jildiz-Kiosk*, kie nun loĝas la sultano, kaj *Dolma-Bagdŝe*, lia plej granda palaco, kiu spegulas siajn longajn, rektajn murojn en la akvo de Bosporo. Kaj meze, antaŭ ni, — *Stambul* aŭ *Istanbul* mem, la ĝojo de ĉiuj turkoj, "la tera paradizo", "la benita

\* La konataj ŝtonegoj en la buŝo de Bosporo.

belulino”, kiel ili ĝin nomas, kun ĉiuj ĝiaj moskeoj, minaretoj kaj turoj.

Ankoraŭ kelkaj minutoj, — kaj nia Jekaterina II estas jam sur sia placo, antaŭ Top-hane, la ŝipa urbparto. Tuj la vaporŝipo estas ĉirkaŭita de dudeko da boatoj, duobla nombro da krieguloj atakas la ferdekon, kaj baldaŭ ĉiu vojaĝanto, ĉirkaŭiĝas per bando da viroj, kiuj ĉiamaniere kaj en ĉiuj eblaj lingvoj delogante kaj devigante penas tiri lin en ĉiujn eblajn direktojn samfoje. Post mallonge ankaŭ ni estas ĉirkaŭbaŭitaj, enŝlositaj kaj pakigitaj en amaso da 20 homoj, kiuj samfoje krias ĉiu en sia lingvo, frapas niajn ŝultrojn, tiras niajn vestaĵojn kaj brakojn kaj volas fortiri niajn pakaĵojn. Dum ia momenta paŭzo, kiun ni akiris kriante svede eble plej laŭte, ni rapide faris la decidon, elektinte individuon de sufiĉe bona eksteraĵo, kiu senĉese trumpetis en niajn orelojn- ”Hotel Pest, gut und billig und à la carte! Hotel Pesth, wissen Sie, gut und billig und à la carte!” — kaj por la pleja konvinkado kalkulis la diritajn tri eminentajn ecojn sur siaj longaj, malpuraj fingroj.

Kun helpo de tiu individuo ni baldaŭ metiĝis en boaton, kaj post kelkaj minutoj la unuan fojon paŝis sur la klasika tero de Konstantinopolo, kie nia unua multekoste aĉetita sperto estis, bedaŭrinde, ke nia elokventulo estas granda fripono, ke la hotelo Pesth estas nek ”gut” nek ”malkara”, sed kontraŭe — pleje *schlecht* kaj *theuer*; eĉ li mem devis ĝin konfesi, sed penis konsoli nin kaj sin per la certigo, ke ĝi almenaŭ estas — ”à la carte”!

## Ĉe Aĥmed' Paŝa', la granda pentristo

*Lingvo Internacia, majo 1896*

**E**stis en Konstantinopolo, kaj la tago estis bela julia tago en la somero pasinta. Mia amiko Nehad Bej kaj mi, ni migris laŭlonge la strato, kiu iras de la ponto de la Galato ĝis Aja-Sofia. La suno bruligis, la hejtanta suno de tagmezo en la sudo — eĉ la plenforta altekreska bulgaro kun nudaj piedoj, brakoj kaj brusto, kun la flavkupra trumpeto en mano, kiu kuris antaŭ la omnibus', tiam kaj iam donante piedpuŝon al ia malrapida hundido, kiu ekdormis inter la koto sur la strato — eĉ ankaŭ li sopiregis pro la varmeco kaj streĉa laboro, dum li senĉese kun la libera mano penis fari elfluon por la riveroj da ŝvito, kiuj sennombraj kiel la fontoj de Nilo, sin elverŝis super lia kuprokolora vizaĝo.

Sed ni du, Nehad Bej kaj mi, ne longtempe deviĝis sopiri pro la varmeco kaj la polvo sur la stratoj de Stambul. Ne multe da tempo pasis, ĝis ni atingis nian celon — la aristokrata domo de Aĥmed Paŝa en unu el la mallaŭtaj, distingaj kvartaloj sur la supraĵo de unu el la sep montetoj de Stambul'. — Tie ĉi supre estis silente, tiel malbrue kaj "nobe". Neniaj vokantaj "verdaĵistoj" (vendantoj de verdaĵo por manĝo) tie ĉi kriis sian eternan *Toma-ti-y-a, toma-ti-y-a*, neniam malgrandaj hebreknaboj tie ĉi kurante ĉirkaŭ niaj piedoj postulis monerojn, neniam levantanoj (homoj el Levanto, la bordo de l'Egea maro) trumpetis en niajn orelojn siajn senmezure emi-

mentajn ecojn kiel gvidantoj kaj — la plej bona el ĉio — neniaj skabiaj hundoj kuŝis fermante por ni la vojon sur la strato.

Ĉe la frapado de Nehad Bej respondis apud la pordo de Aĥmed ia platnaza, fulgenigra individuo, kiu, ŝajne, venis rekte el la Geheno, sed en vero kredeble nur estis el la plej suda Sudana provinco de l'Egipta khedivo.

Grimacante saluton de bonvenado, tiel ke la buŝanguloj malaperis en necerta malproksimo apud la regionoj de l'oreloj, li faris ĝentilegan orientan kliniĝon antaŭ mia altekreska turka amiko kaj, post mallonga rigardado de mia malsignifa persono kaj mia blanka sveda ĉapelo de studento, li rapide forkuris por anonci al sia sinjoro, la potenca Aĥmed Paŝa, la fidelulo de l'sultano kaj eminenta ano de l'Grand-Sinjora kortego.

Dume alia servantulo min kondukis en la domon tra kelkaj koridoroj kaj super unu larĝa tapiŝa ŝtuparo, ĝis ni fine alvenis en la ĉambron de vizito.

Por mi, kiu pensis trovi ĉambron de turka modelo, kun longaj, malaltaj kaj molaj kanapoj laŭlonge la muroj, kun floraj ŝtofoj kaj multkoloraj teksaĵoj ĉie pendigitaj — kie konvenas kaj kie ne konvenas —, kun argilaj potoj kaj stanaj vazoj de stranga formo en vicoj sur la bretoj de muro, kaj plu en la sama stilo — por mi la vizita ĉambro de Aĥmed ŝajnis tute surprizanta. Kelkaj invitantaj malgrandaj kanapoj, tie kaj ie tabureto, granda tablo plena da modernaj ilustritaj verkoj, kelkaj *staflioj* kun pretaj aŭ ankoraŭ ne pretigitaj pentraĵoj, kaj la muroj kovritaj — ne per multkoloraj ŝtofoj el Persujo, kaj Kaŝmir', sed per tute eŭropaj desegnaĵoj, gravuroj kaj fotografaĵoj kune kun ia pentraĵo. Inter la multaj portretoj de anoj de eŭropaj princedomoj aparte unu okupis mian aten-

ton; estis de Oskar 1:a, nia reĝo, en uniformo de admiralo kaj ornamita kun la nomo, skribita, ŝajne, per la mano de l'reĝo mem.

Mia amiko Nehad — sed mi do forgesis prezenti lin al miaj legantoj! Li estas leŭtenanto ĉe la dragona regimento ĉevala de Lia moŝto Grand-Sinjora kaj cetere neordinare imponanta kaj bela viro. Lia kresko alta kaj gracia portas bele formitan kapon kun trajtoj, kiam li silentas, ŝajne fanditaj el bronzo, sed kiam li parolas — en franca kaj en tute bonega, eminenta franca lingvo — ili viviĝas per la ŝanĝantaj dispozicioj de sentoj, kiuj, kontraŭ la turka kutimo, ŝajne regas mian amikon. Cetere estas la fundamento inter ili ia nesuperiĝebla kaj preskaŭ ne tro alte taksebla amindeco kaj amikeco, kiun malŝpare elverŝas ĝia posedanto sur la nemeritanta fremdulo el malproksima Nordo.

Sed dum mi staras okupite rigardante la akceptan salonon de Aĥmed Paŝa kaj la militistan kreskon kaj vire belan vizaĝon de mia akompananto, tiam subite malfermiĝas la pordo kaj eniras la mastro mem, Aĥmed Paŝa, la granda kortegulo kaj artisto. Malalta kaj ronda li estas kaj ŝajnas pli humora ol precipe imponanta kun tiu malgranda "stomakego", la nigraj, ludantaj okuletoj, kiuj tre similas al sekvinberetoj en tritikbulko, kaj la buŝo, sur kiu ludas humoristika rideto.

Al Nehad Bej, kiu en sia elkora ĝentileco kaj en la sento de l'alta rango de sia estro, ne tute bone scias, kiel profunde li kliniĝos aŭ ĉu sur la piedoj li riskos stari, — al li Aĥmed salutas ĝuste *à la turque* t. e. kun la du manoj levigitaj ĝis la temploj kaj la manplatoj etenditaj unu kontraŭ la alia. Mi do kontraŭe ricevas post la prezentado koran tute "okcidentmondan" manpremadon kaj post mallonge mi kun la mastro estas

en viva interparolado pri mia patrolando, kiun li tute ne konas, kaj ĝia reĝo, kiun li kontraŭe vidis kaj trovis "ĉarmanta".

Sed baldaŭ Aĥmed Paŝa transiras al aliaj aferoj, ĉar li nur duone estas diplomato kaj monda homo, kaj plej proksime al lia koro sendube kuŝas lia *arto*. Kaj simile al ĉiuj "diletanto", li tre volonte montras siajn laboraĵojn kaj aŭskultas la opiniojn pri ili. Ankaŭ mi nun devis diri mian opinion pri liaj pentraĵoj, kvankam li ne povis sci, ĉu mi komprenis liajn pejzaĝojn kaj "stilleben'ojn" pli bone ol ia bovino. Unu post l'alia estis eltirita el la granda amaso da pentraĵoj, kiuj kovris la *stafliojn* kaj starigilojn kaj staris en amasoj apud la muroj; jen pejzaĝoj el Malgranda Azio, kun freŝa kaj superfluanta kreskaĵaro, jen el la senarbaj montetoj apud Bosporo, jen estis plenviva strata sceno el Stambul, jen ree ia frukto-, besto- aŭ floropentraĵo.

Li estis tre multflanka en sia pentrado, la bona paŝa', sed parolis tre humile pri sia talento, kio tamen ne malhelpis, ke liaj okuletoj lumiĝis per kontenteco, kiam mi elparolis mian raven je liaj vere tre prosperitaj floropentraĵoj. Li ne laciĝis, priskribante, kie, kaj ĉe kiuj kondiĉoj ĉiu aparta pentraĵo estis farita, kaj rakontis laste ke la laboraĵo, kiu nun lin okupis, estos donaco al lia Ottomana majesto.

Kaj nun la kafo estis enportita, la kafo, kiun oni senkondiĉe trinkas en ĉia vizito ĉe unu *osmanli*. Estis la ordinara turka malbonaĵo, kuirita tute dika kaj kun sukero, ke ĝi similis al ia bruna melaso. Sed krudigita per tio, kion mi antaŭe suferis en tiu speco, mi sengrimace malplenigis mian malgrandan taseton, en grandeco simila al ia ovingeto. Nehad Bej videble kontentege gustigis la dikan dolĉegan trinkaĵon kaj englutis

grandegajn kvantojn de la sengusta, fadena kaj pastema turka konfitaĵo, kiu samtempe estis ĉirkaŭportita.

L'aŭdienco estis finita kaj ni leviĝis por adiaŭdiri. Sed tiam sekrete *Aĥmed* rakontis, ke li posedis ion, kion li devis montri al ni antaŭ ol ni iros. Kaj nun ni sekvis lin malsupren la ŝtuparon kaj poste per kelkaj tute turke aranĝitaj ĉambroj kun tapiŝoj kaj "divanoj" (kanapoj) kaj lignaj kradoj antaŭ la fenestroj, ĝis li fine haltis apud la eniro en sufiĉe malgranda, longeta ĉambro, malalta kaj ne tro bone lumigita. En la fono aperis tuta floraro kun grupoj kaj florbedoj kaj tie-alie iaj belegaj granat- kaj oranĝarboj kun iliaj brilaj fruktoj.

"Mais dites donc, mon general, ou'est ce que vous avez la?" Kaj mi ekkomencis esprimi mian miron vidi tutan ĝardenon enmigrintan en tiu ĉambro, kiu devus esti tre malbona oranĝerio. — Mi malofte aŭdis pli koran ridon ol tiu, kiu sekvis miajn vortojn. *Aĥmed Paŝa* ridis tiel ke lia stomaketo saltadis kaj la sekaj vinberetoj tute malaperis en la tritika bulko, kaj *Nehad Bej*, kiu estis enigita en la sekreto, ridis kvazaŭ laŭ ofico kaj batis liajn genuojn en gajo, dum la malgranda paŝa' deviĝis sidiĝi, por ke li ne perdu la egalpezon.

La gajeco de l'du turkoj sendube estis infektanta, sed ne scianta, je kio ili en vero ridis, mi komence iom ĝenis kaj min tenis serioze, ĝis la malgranda paŝa', kun la larmoj ruliĝantaj super liaj grasaj vangoj, fine elkriis: "Sed ĉu vi do ne vidas, ke ĝi nur estas pentraĵo? Estas ke mi min amuzis dekoracianta la muron tie kun floroj kaj arbetoj kaj arboj — kaj ĉiuj enirantaj tien-ĉi pensas ke estas malgranda ĉambroĝardeno. Ho ho ho, hi hi hi," . . . kaj li denove enfalis en vida paroksismo, en kiu mi nun volonte partoprenis.

Kaj tiam li rakontis al mi — tute ne por fanfaronado sed

”nur kvankam” — ke unu fojo li prosperis pentri sur blanka muro en la ĝardeno de l’sultano unu floran bedon tiel naturan — parole d’honneur, monsieur, nenia fanfaronado, nur la vero — ke Lia Moŝto Grand-Sinjora favore lasis sin trompiĝi kaj aliris por preni unu floran! Kaj la ĝardenisto poste venis kun sia akvujo kaj superverŝis la pentritan de Aĥmed florbedon egale malŝpare kiel la florojn kiujn li mem antaŭe plantadis — faro, kiu kuntiris super la kapon de l’ĝardenisto la Grandsinjoran malfavoron, kiu tamen estis reprenita, kiam Aĥmed Paŝa remetis la florojn en ilia unua brila ordo.

”Sed Vi do estas alia Apelles, mia generalo, kaj kompare vin, estis Zeuxis kaj Panhasios nenio alia ol simplaj nudaj maltaŭguloj!” — Mia komplimento estis akceptita kun favora rideto, — ankoraŭ unu manpremo kaj post kelkaj minutoj estis mia vizito ĉe Aĥmed’ Paŝa’, la granda kortegulo kaj artisto — nur unu rememoro.



## En Peterburgo

*Lingvo Internacia, junio-julio 1896*

**L**a horloĝo en la katedralo Kazanski ĵus sonas kvar, kiam mi en bela junia mateno sola promenas sen celo, sur la stratoj de S.-Peterburgo. Aŭ se mi havas ian celon, tio estas nur vidi kiel dormas la granda *metropolo*. Oni devas preni l'okazon dum ĝia flugado, ĉar Peterburgo ne dormas longtempe. La norda nokto de somero ja invitas mem ŝanĝi la nokton en tagon kaj tio ĉi estas invito, kiun akceptas tre volonte la peterburganoj. — Sed nun ĵus komencis la tempeto, en kiu iom post iom ekdormiĝis la nokta bruoj kaj ankoraŭ ne vekigis la klopodoj de l'tago. La sola piediranto ekvidiĝas en la fino de l'stratoj kaj ia dormema izvoŝĉiko (veturigisto) malrapide kondukas sian lacan kvazaŭĉevalon. La veturilo pre-



EN NEVSKI.

skaŭ sensone rulas, ĉar la radoj estas, kiel ofte tie ĉi, vestitaj per kaŭĉukaj ringoj — sed la frapado de l'hufoj sur la strato tamen vekigas tie kaj tie iun *dvornik'on*, kiu dormetante sidas en ia angulo antaŭ la domo, kiu estas sub lia gardo. Videble li sonĝis pri ia Elizio, en kiu li ne bezonas balai la straton kaj kie li povas



DVORNIK.

pace dormi ĉiun nokton — kaj ke li deviĝas forte froti siajn okulojn por povi reveni en la multmaniere krudan efektivecon. Sed ĉar videble nenia danĝero ekestas, li tiras la ŝafpelton pli bone ĉirkaŭ si, turniĝas al alia flanko, kaj denove eniras en sian Elizion — forte ronkante.

Sed dum mia promeno mi fine atingis la *Marmoran palacon*, kie mi haltas sur la surbordo apud la maldekstra Nevabordo. La suno jam rompas la matenajn nebulojn, kiuj kiel ia vualo pendas super la urbo kaj rivero, kaj briletas gaje en la saltantaj ondetoj de l'grandega *Neva*. Sur l'alía bordo de l'larĝa rivero sin montras al mi la malaltaj konturoj de l'antikva Peter-Paŭl-fortikaĵo, el kies mezo la Peter-Paŭl-katedralo levas sian gracion turon plej alte inter ĉiuj preĝejoj en la urbo. Pinta kaj brilanta kiel origita kudrilo ĝi sin levas, portante tie supre grandegan anĝelan figuron kun flugiloj. — Tiu preĝejo nun estas ia speco de *Panteon*, en kiu preskaŭ ĉiuj rusaj *caroj*, de Petro I. estas enterigitaj, kaj ĝi ankoraŭ estas tute plena de

la sennombraj orkronoj, kiuj el diversaj lokoj, precipe el Rusujo kaj Francujo, estis senditaj al la enterigado de Aleksander III.

De la pinta tegmento de la Peter-Paŭl-katedralo glitas la rigardo super *Neva* ĝis Vasili Ostrov, granda insulo inter la du brakoj de *Neva*, sur kiu komerco kaj navigado en Peterburgo havas sian ĉefan lokon. La borso tie en la pinto de l'insulo, malbela konstruaĵo en kvazaŭgreka stilo, ŝajnas preskaŭ bela en la matena lumigado, kiu kolorigas ĝiajn blankajn murojn ĉarme or-ruĝaj kaj donas al la konstruaĵo pli molajn konturojn ol sub la radioj de l'hejta suno de tagmezo. Mallonge poste ekvidiĝas la grandegaj masoj de konstruo de l'Sciencakademio, la Oficira lernejo kaj l'Akademio de artoj — inter la fumtuboj kaj mastoj de l'vaporŝipoj, kuŝantaj apud la surbordo.


Sed kiam la suno leviĝas sur ĉielo, jam ankaŭ komencas la pulsoj de l'Neva-urbo pli forte bati. Veturiloj de brulaĵo kaj verdaĵo, kiujn tiras grandaj blankaj ĉevaloj kun la karakterizaj grandaj altaj pentritaj jugoj ek-krakegas tie kaj ie sur la malbonaj stratoj de Peterburgo; la *dvornikoj* jam ne povas plu dormi pace pro la bruo — unu post l'alia ekleviĝas, skuas sian nekombitan kapon kaj ekserĉas la balailon, por povi komenci la matenan okupadon.

Jen apud la marbordo sur la "flanko viborga" aŭdiĝas kanto de malkleraj viraj voĉoj — ia dekduo de havenlaboristoj kiuj komencas sian laboron kun komune kantita kanto. Ili vidiĝas sufiĉe pitoreskaj en siaj fortkoloraj ruĝaj kaj bluaj ĉemizoj kun zono ĉirkaŭ la talio.

Baldaŭ komencas sian iradon la malgrandaj vaporŝipetoj sur la Neva; estas amaso da ŝipetoj, kiujn posedas iu finna

societo kaj sur kiu oficas preskaŭ nur finnoj. Ne malmultaj komprenas mian lingvon — la svedan, sed, kompreneble, ne niu Esperanton. Kiam fariĝos saĝa nia mondo? — Cetere tiuj ŝipetoj estas eminente bone kondukittaj. Dum 25 jaroj ili surradis ĉiujn brakojn de la *Neva* kune kun la kanaloj de Peterburgo — Fontanka, Mojka k. c. — sen pli ol *unu* malfeliĉaĵo. Bona pruvo de l'taŭgeco kaj konfidindeco de l'finna gento.

Tiel, post du horoj de dormetado (kvazaŭdormo) denove jam vekigis la grandurba vivo. Izvoŝĉikoj vestitaj en la tradicia longa blua mantelo kun zono ĉirkaŭ la talio kaj sube dika ŝafopelto, kondukas en la stratoj laŭ centoj kaj miloj siajn veturilojn kun aŭ sen kaŭĉukaj ringoj en dormema kvazaŭrampado aŭ en kureganta galopo — laŭ la emo kaj deziro, en Peterburgo oni havas la rajton veturi kiel ajn rapide, ŝajnas. Tute ne malofte oni vidas paron da nigraj ŝaŭmitaj ĉevaloj en plej sovaĝa galopo trakuregi *Nevski prospekt*, la pulsarterio kaj plej granda strato de Peterburgo. Strange, ke tiel malofte okazas malfeliĉaĵoj, — sed la *izvoŝĉikoj* ordinare estas nesupere-



ble lertaj kaj cetere ili tiel freneze kriegas, ke oni devas esti surda, se oni ne aŭdas kaj sin gardas.

En junio cetere la strata vivo en Peterburgo estas nenio, kompare la vintron kaj printempon. La plej granda parto de la nobelularo, kaj riĉularo jam en komenco de l'monato, forloĝas el la urbo (vere ne strange!) al siaj somerloĝejoj ĉirkaŭ *Viborg* apud la Finna golfo aŭ suden al *Carskoje Selo* k. c. — kaj kiam ĉiuj la elegantaj ekipaĵoj, kiuj alie ornamadas la stratojn Peterburgajn, forestas, tiam ŝajnas la tuta urbo loĝita de izvoŝĉikoj; estas ĉefe nur iliaj komikaj, grasaj dorsokurbaj apearajoj, kiuj donas al Peterburgo karakteristikan stampon; cetere ĝi sufiĉe similas tion, kion om vidas en Stokholmo.

Kaj vere, Peterburgo apenaŭ tute estas rusa urbo; ĝi estas, en tutaĵo almenaŭ, preskaŭ okcidenteŭropa. Vera estas ke en privata vivo, oni povas trovi multajn trajtojn tute rusajn, sed la ekstero de P. estas tute kosmopolita. Kaj tiu urbo ankaŭ enhavas en si milojn da fremdlandanoj: finnoj, estoj, germanoj, ne malmultaj svedoj, francoj k. c. La finnoj ordinaro loĝas en la urbparto *Viborgskaja storona*, norde de Neva, kie oni ofte inter rusaj muĵikoj (vilaĝanoj) kaj nigrokulaj ciganoj vidas la konfidajn blujajn okulojn kaj la "linan" hararon de ia *tavasto* aŭ unu brunokulan, brunkoloran, brunharan individuon el *Karelujo*.

La plej "highest fashion" parton de l'urbo oni trovas sude de l'Neva. Tie, laŭlonge la bordo de Neva kaj apud la glora Nevski Prospekt kuŝas preskaŭ ĉiuj luksaj konstruaĵoj de Peterburgo. Ili ne estas malmultaj; oni nomas Peterburgon la "urbo de palacoj", kaj ĝuste, ĉar ilia nombro, kiel tiu de l'preĝejoj ŝajnas nekalkulebla. Sed, kun malmultaj esceptoj, ĉiuj estas malstilaj kaj ne tuŝas la rigardanton. La *katedralo de Isak'*

kun ĝia grandegula, tute origita kupolo kaj ĝiaj kolosaj kolonoj, *monolitoj* el polurita finna granito, vere donas la potencon impreson de grandeco kaj forto, kiun oni postulas de la ĉefa preĝejo en la ĉefurbo de Rusujo, sed mankas al tiu ĉi konstruaĵo, kiel al plej multo da rusaj preĝejoj, la nobla mezureco, kiu sola povas doni samtempe gravecon kaj ĉarmon. — La saman oni povas diri pri la internaĵo de preĝejo; tie estas sennombraj kostajoj, multekostaj kaj belaj or- kaj arĝentaĵoj, amaso da juveloj, — sed ĉio estas amasigita sen gusto, sen la penso pri harmonia tutaĵo. — La dua granda katedralo en Peterburgo estas tiu, kiu nomiĝas *Kazana*; kiel la leganto eble scias, ĝi estas imitaĵo de l'granda San Pietro-preĝejo en Romo; ĝi ne estus sen impozo, se ĝi starus libere sur monteto, sed nun enŝlosita preskaŭ ĉieflanke de aliaj konstruaĵoj sur malgranda placo apud Nevski, ĝi ne impozas la rigardanton. En la intero oni trovas belegajn kolonojn kaj amason da multekostajoj.

Inter la palacoj sin distingas la "Vintra palaco" kaj l'"Ermitaĝo" l'unua per sia grandegeco, l'alía per sia nobla pura formo, kaj kia brila, arta enhavo. La Vintra palaco spegulas siajn longajn flavajn murojn en l'akvo de l'Neva. La ekstero ne estas de pli alta arta indo, sed l'interio, kontraŭe estas tiom pli altiranta. Kune kun mia kolego de vojaĝo, mi tie pasigis kelkajn ĝuplenajn horojn, ĉirkaŭirante kaj rigardante la amason da artaj objektoj de ĉiuj specoj, kiuj tie sin trovas en nekalkulebla nombro — bele kaj arte ordigitaj kaj tiel aranĝitaj, ke oni en ĉiu minuto sentas la senton de *ĉambro*, ne de *muzea salono*.

Tute flanke de l'Vintra palaco ni trovas l'Ermitaĝon, belan konstruaĵon en greka stilo, al kiu faris fundamenton Jekate-

rina II sed, kion pretigis Nikolaj' I kun nepriskribebbla brilo. Tien ĉi estas dum daŭro de l'jaroj amasigitaj per la potencaj reĝoj de l'granda car-regno amasoj da artaj objektoj de plej granda indo, tiel ke nun la kolektaĵo de l'Ermitaĝo estas kalkulita kiel unu el la plej ĉefaj en la mondo. Precipe estas la galerio de pentraĵoj malordinare riĉa kaj bela, enhavanta grandan nombron da verkoj de l'plej grandaj majstroj de l'mondo. Mi tie ĉirkaŭmigris senlace dum horoj, de Rafael al Tician, de Tician al Murillo, al Rembrandt, van Dyck kaj Teniers kaj multaj aliaj inter la "klasikoj." Italoj kaj holandanoj, francoj, germanoj kaj hispanoj — preskaŭ ĉiujn naciojn mi tie trovis.

La artistoj de Rusujo mem tamen ne estas tro multnombre reprezentitaj en la muzeo sed anstataŭe ni de iliaj manoj trovas tie kelkajn verkojn, kiujn oni devas meti inter la perloj de l'kolektaĵo. Tiaj mi kalkulus la pentraĵon de Ajwaizowski: "Ventego sur Maro Nigra", kies ŝaŭmaj, siblegantaj, travideblaj ondoj estas prezentitaj kun nesuperebla realismo — kaj la "Danco de arbaraj nimfetoj" de Marovski kun ĝiaj ludantaj ĉarmaj virin-figuroj kaj fine "Kristus" kaj "Mefistofeles" de l'granda skulptisto Antokolski. Ne ofte "Kristus antaŭ siaj juĝistoj" estas prezentita tiel sublime, tiel en samfoje ideala kaj realisma maniero, kiel en la nomita skulptaĵo, — kaj neniam do la reĝo de l'profundaĵoj trovis komprenulon, kiu povis pli nature redoni la demonan altecon kaj la mavarman trankvilon en liaj trajtoj, tamen ne formetante la esprimon de la kvazaŭ personigita ruzeĝeco, kiun ni al kutimiĝis vidi en la figuraĵoj, prezentantaj lin.

La kolektaĵoj de l'Ermitaĝo, kiuj enhavas la plej diversajn kaj plej interesajn objektojn (interalie ankaŭ amason da pre-

cipe ŝatindaj antikvaĵoj el la grekaj kolonioj en Krim) apartenas al la privata havaĵo de l'caroj. Kaj ili estas tiel amindaj permesi la publikon ĉiu ajn tago dum 5 horoj migradi en ĝiaj belaj salonoj. Sed sendanke, kiel ŝajnas — ĉar almenaŭ dum miaj vizitoj en la muzeo mi tie migris multhore — preskaŭ sola. La pleja nombro de l'vizitantoj ŝajnis fremduloj; multaj peterburganoj, kiuj almenaŭ *volas* esti kalkulitaj inter la vere kleraj, eĉ unu fojo ne vizitis la Ermitaĝon.

Kion do ili faras? Ili havas aliajn amuzaĵojn. Vespere ili en milnombroj vere fluadas al la ĉiuj amuzejoj, kiuj estas unu apud l'alia sur la insuloj apud la buŝo de Neva — Livadia, Arkadia, Krestovski kaj kiel ajn ili nomiĝas. Tiel ili sidas la tutan nokton trinkante kaj fumante kaj rigardante la "vidindaĵojn" de l'someraj teatroj. Tiuj ĉi estas sufiĉe simplaj, kaj oni malfacile komprenas, kiel ili povas logi publikon, kiu horo post horo sidas amuzante sin per ĉiuj numeroj de l'programo. La plej bona de tiuj lokoj sendube estas la Zoologia ĝardeno, kaj tie ankaŭ la publiko estas malpli "duba". Mi tie pasigis unu

vesperon kune kun ia finna amiko kaj unu juna georgiano (el Gruzujo) kun lia patrino kaj fratino kaj tiam mi povis vidi, kio plaĉas al la peterburga gusto. Unue oni prezentis al la rigardantoj grandan "fe-aĵon", kiu estis akceptata kun freneza aplaŭdado, precipe post la lasta akto, en kiu sin montris la "Malbonulo" mem, kaj ĉiuj liaj servantoj de diversaĝo faris



TARTARO, AĈETANTA MALNOVAJN VESTAĴOJN.



grandegan "dancon de l'profundaĵo" sub elektra lumo de ŝanĝanta koloro. La baletoj de l'rusoj estas sufiĉe konata kiel neordinare bela kaj vere estis amuzante vidi la malgrandajn demonetojn kiuj, vestitaj en fantaziaj multkoloraj vestaĵoj kaj kun grandaj ruĝaj aŭ bluaj maskoj, svingis sin unu kun la alia en nesuperebla ĉarmo. — Nun oni vidis akrobataĵon de precipe lertaj "aerartistoj"; poste kantis aro da junulinoj, kiuj nomiĝis ciganinoj; poste saltante venis unu rusa vilaĝa junulo kun sia man-orgeneto (rusa muzikilo) kaj kantis kantetojn, kiuj kredeble estis tre amuzantaj — por tiuj, kiuj ilin komprenis. Kaj tiel plu senfine.

Sed tion similan oni vidas en ĉia lando, en ĉia urbo kaj ion specifice rusan oni ne trovis inter ĉio tio. Se vi volas vidi ion vere rusan, iru al Moskvo, kiel ankaŭ ni faris, mi kaj mia kolego, — kaj estu konvinkita, ke oni ne plendos la vojaĝon de 600 km el "la kapo de Rusujo" al "la koro de Rusujo".

Ĉu mi devas plendi,  
ke mi lernis Esperanton?  
*Impreso el vojaĝo*

*Lingvo Internacia, septembro 1896*

**E**n Varsovio? Ĉu songo aŭ vero? — Kompreneble songo. Ĉar pensoj, songoj kaj esperoj, kiujn havis la homo en infaneco, ordinare restas nur pensoj, songoj kaj esperoj. La infano, kiu kun koro batanta sekvis en penso la heroojn de sia lando ĉe iliaj bravaj preskaŭfabelaj iregadoj en Polujo, — li multe songis viziti tiun nekonatan por li kvazaŭmisteran landon kaj konatiĝi kun ĝia brava popolaĵo, ĉiam kavaliroj, eĉ kiam ili estas malamikoj. Kompreneble tia infana songo ne povis efektiviĝi, estante la lando malproksima, la lingvo nekomprenata, la popolo nekonata, ĉio, per unu vorto, nebla.

Kaj tamen mi dum kelkaj tagoj songis tiel klare, kvazaŭ estus vero, ke mi min trovas en Varsovio. Ravanta estis la songo, ravanta tiu tempeto, plena da plezuro, simila al preterfluganta momento; — naturo, arto, homoj sin prezentis al mia ĝueganta okulo en plej hela, plej bela lumo.

La efektivaĵo ja ĉiam estas malhela kaj malbela laŭ la pesimistoj; tial ankaŭ ne povas esti efektivaĵo mia estado en Varsovio. Sed mi devas konfesi al Vi, mia estimata legantino aŭ leganto, ke la pesimistoj estas grandaj friponoj, por kiuj la *vero* estas tiel grandega kaj trezora, ke ili kelkfoje ĝin, plej zorgeme ... kaŝas. Kaj mi riskas nun supozi tielan okazon, ĉar precize en la momento de vekiĝo el mia songo mi posedas impresojn de beleco kaj boneco tiel profundajn, ke ili ŝajne ne

povas esti naskaĵoj de eraranta fantazio: nur la efektivaĵo mem metas en mian animon tiel neelstrekeblajn postsignojn. Kaj tial mi ankaŭ riskas nomi la belan songon efektivaĵo, ĝis troviĝos iu, pruvonta la kontraŭon.

Kiel al mi, kiam mi estis ankoraŭ hejme, ŝajnis Polujo senfine malproksima, tiel nun la hejmo ŝajnas proksima. Ĉu vere estas inter ni tiom longa spaco? Mi kalkulis, ke en 36 horoj mi povas veni hejmen, forlasinte Varsovion!

Pro kio do estas eble, ke mi venas en Varsovion preskaŭ la unua el miaj kunlandanoj? — Ho, mi forgesis, ke la svedoj jam multfoje kaj multnombre faris vizitojn en Polujon. Sed bedaŭrinde miaj prapatroj ne ĉiam estis tre ĝentilaj, kaj mi devas konfesi, ke ili sin montris iom tro similaj al la sovaĝa reĝo de l'bestoj en iliaj arbaroj, al la urso norda, tiel ofte batalita kaj venkita de ili; ili prenis lian moron, kaj ilia ĉirkaŭpreno fariĝis tro forta por alilanduloj.

Kompreneble ni, la nuntempaj svedoj, ne devas deziri, ke tielaj vizitoj estu redonataj al ni — kaj vere mi ne venis Polujon kiel ambasadoro por peti "revanŝon". Sed longaj tempoj jam pasis, kaj la pasintaj, feliĉe, ne revenos; knaboj ludas, malpaciĝas, batiĝas — kelkfoje eĉ sange, — homoj grandaĝaj do, almenaŭ la saĝaj, ne estas kontentaj per sole *ne batiĝo*, ili volas preni la manon unu de la alia kaj komune agi por komunaj celoj. Venante kun tia intenco la poloj trovos ĉe ni la plej varman akcepton, — kiel ankaŭ mi trovis ĉe ili.

Kaj la komunaj celoj de nia tempo, kiuj ili estas, se ne kulturo kaj civilizacio? Tie estos la kampo, kie devas renkontiĝi kaj kolektiĝi la laborantoj de ĉiuj nacioj, kuniĝante "nur en unu rondon familian". Sed kia estos la komuna agado de, ekzemple, svedoj kaj poloj sur tiu kampo? Ĝis nun, mi timas,

preskaŭ nenia. Kelkaj libroj, tradukitaj, kelkaj sciencaj rezultatoj, tre malmultenombraj, donataj de unu nacio al la alia, jen estas ĉio! Nenia konstanta interŝanĝo de pensoj, de ideoj, neniaj konstantaj vizitoj — entute, nenia interligo. Oni min demandis en Varsovio: "Ĉu vi konas, vi svedoj, niajn glorajn pentristojn kaj verkistojn de nuna tempo?" — Kaj kun honto mi devis respondi: "Oni konas de kelkaj viaj verkistoj vivantaj — la nomon. Senkieviĉ, Orzeŝko, Konopnicka posedas ja eŭropan gloron; eble iu aŭ alia legis de ili rakonton aŭ romancon, tradukitan iafoje en svedan lingvon (pere per la germana!). Kaj la pentristoj? Estas sufiĉe diri, ke la nomoj Siemiradski. Matejko, Brandt k. c. por la plejmulto de nia publiko povas esti ĥinaj egale bone kiel polaj." —Kaj baldaŭ mi ekscis, ke la poloj, eĉ la plej kleraj, pri nia literaturo kaj arto konas egale multe kiel la svedoj konas pri la pola.

Kia do estas la kaŭzo de tia malgaja cirkonstanco? Ĉu ni povas supozi, ke en la ambaŭ landoj ne ekzistas sufiĉe multe da personoj kun komuna, vasta, intereso, personoj, kiuj komprenas la grandan gravecon de internacia ŝanĝo de pensoj kaj ideoj? Ho ne, certe ili ekzistas, kvankam eble la komuna homa indiferentismo malhelpas al la agado. Sed la ĉefa malhelpo certe estas alia, kaj kia do, se ne diferenco de lingvoj? Tiu malfacilaĵo, kiu estas sentata en tuta la mondo kaj en ĉiaj tutmondaj rilatoj faras grandan malhelpon, dividas ankaŭ la polojn kaj svedojn per muroj ŝajne nesupereblaj. Ĉar estante la lingvoj treege malsimilaj unu al la alia, ili donas tro multe da laboro por la lernado.

Sed malgraŭ tiaj cirkonstancoj, malgraŭ ke mi tute ne scis eĉ vorton de la pola lingvo mi povis pasigi ĉe la poloj, vivante meze inter ili, kelkajn semajnojn, plenajn da ĝuo plej alta, plej

nobla, ĉar mi ĝuis la societon de bonaj, graciaĵoj kaj alte kleraj homoj. Se mi por tio devas danki, unue kaj laste, mian noblan polan amikon, kiu min enkondukis en la rondon de siaj amikoj, do tamen ne devas esti forgesita, unue ke tiu amiko estis akirita sole *per Esperanto*, due ke sen nia kara lingvo nia kunestado estus iom enua kaj ne tro multe interesa, ĉar ni tute ne povus interparoli unu kun la alia! Danke nur al Esperanto estis eble por mi fari la viziton al la poloj kaj danke nur al Esperanto mi estis enkondukita en tute novan mondon de ideoj kaj pensoj, konatiĝante kun la pola popolo, ĝiaj pensoj, moroj, kutimoj.

Kaj tamen oni diras, ke la lingvo internacia estas al nenio taŭga, por nenio utila! Mi do devas konfesi laŭ miaj spertoj en Rusujo en la jaro pasinta, kaj en Rusujo kaj Polujo en tiu ĉi jaro, ke nia komuna kara lingvo esias taŭga por ĉio, por kio taŭgas ĉia ajn alia fremda lingvo kaj utila pli multe ol ia ajn alia lingvo, se oni ne rigardas la pure ekonomian flankon — en tia rilato, mi volonte konfesas, ke Esperanto donas nenion — sed la flankon de komuna anima elkreskiĝo, evolucio, kaj de la profundiĝado de pensoj kaj sentoj, kiuj sen ĝi eble neniam eĉ naskiĝus.

Kaj mi estas konvinkita, ke ĉiu esperantisto, kiu nur volas, povas fari la saman sperton. Mi ne volas promesi, ke li nepre en ĉia fremda lando pasigos tempon tiel plenan da intereso kaj plezuro, kiel mia estado ĉe la poloj kaj rusoj, sed sendube li efektive trovos, ke la malgranda peno lerni nian lingvon donis al li veran rekompencan. La demando pri Esperanto ne estas jam: ĉu ĝi taŭgas por interparolado kaj por skribado? sed la demando nur estas: ĉu ĝi taŭgas por mi, por miaj specialaj celoj? La demando pri la komuna taŭgeco de Esperanto

estas jam multfoje brilante solvita: svedoj parolas kun rusoj, poloj kun svedoj, rusoj kun francoj, germanoj kun poloj k. e. — kion do plu? Ĉiu, kiu volas agadi ion en eksterlando, devas agadi kun helpo de Esperanto: — en internaciaj rilatoj estas jam necesa internacia lingvo.

Sed oni diras, ke Esperanto estas arte kreita lingvo, ne vivanta kaj neniam povanta vivi. Mi respondas: ne, mil fojojn ne! Esperanto estas arta lingvo, vere, kaj — mirinde — ĉiuj lingvoj montriĝas esti artaj; sed Esperanto ne estas morta lingvo, kiu ne povas vivi: — kontraŭe, ĝi vivas, vivas ĉiam, kaj vivos ĉiam en la koro kaj sur la lipoj de sinceraj amikoj, trovantaj unu la alian per nia amata lingvo kaj subtenantaj ĉiam inter si la plej fortan ligon per unu sola ligilo — per tiu sama nia lingvo Esperanto.

*Varsovio, en 1896.*

## Du blinduloj

### *Sceno el la lando de Donaj kozakoj*

*Lingvo Internacia, oktobro 1898*

**I**o okazis; pri tio ĉi oni ne povis dubi. Sed *kio* — tio estis pli ol iu povis diri.

Ni nur vidis, ke homoj rapide kuradis trans la platformo de l' malgranda fervoja stacio sur la Dona stepo en kozaka lando, kie ni estadis — lanternoj estis svingitaj en nervuma malpacienco, kaj la vagonaro restis sur la reloj, kvankam devus antaŭ longe foriri. Ia malfeliĉo? ...

La fervoja inĝeniero, la distancoestro, kaj lia kolego de la proksima distanco, kiu ankaŭ estas en nia societo, ekŝanĝas signifajn rigardojn, kaj Avanov, la princo, kiu ĵus agordis sian mandolinon por elludi mazurketon, lin oni sendas por esplori la situacion. Avanov entute neniam diras ne, kiam oni lin petas pri io, kaj kompreneble tial oni lin uzas por ĉio ebla. Dume, oni ne povas diri, vere, ke li estas pli konfidinda ol aliaj — jes oni eĉ pli alproksimigas al la vero dirante ke *malpli*, kaj ekzistas iu aŭ alia, kiu ankaŭ ofendiĝas je li, parolante ke li preskaŭ neniam diras unu veran vorton kaj malofte plenumas sian promeson. Sed ne rigardante tiun malgrandan mankon li do estas sufiĉe bona por la societo, ĉar malgraŭ siaj kvindek jaroj kaj grizaj haroj li estas "gaja knabo" kaj plena je friponaĵoj kaj ridindaĵoj.

Li, sekve, estis sendata la kelkajn paŝojn ĝis la stacidomo por eksci, kio do estis. Sed antaŭ ol li eĉ alvenis, okaziĝis io, kio unue envolvis la situacion, sed poste helpigis ĝian klari-

gadon. Ni ĉiuj ekaŭdis subite unu krion aŭ, pli guste, unu malklaran, sed penetrantan akran kriegon, tiel tranĉante teruran, ke ŝajnis al ni kvazaŭ tuta mondo da doloro estus en ĝi enŝlosita. Ni aliaj ne komprenis ĝian signifon, sed Anna Fedorovna, la mastrino, videble tuj per ia nekomprenebla instinkto eksciigis pri la situacio: ŝi rapide ekkrietis: "Ho, mi komprenas", kaj kun signifa ekrigardo al ni ŝi forkuris el la balkono, kie ni sidis, en la domon.

Avanov tuj revenis kaj tro graveme informigis, ke ia homo estis falinta sub la radojn de l'vagonaro sed, laŭ kutimo, ne niu aparte ekvolis kredi al li, tiom plu ĉar la vagonaro, kiel ni sciis, jam staris senmova dum dudek minutoj. Tial ni ĉiuj foriris por ekscii pri la afero, kaj jam ni staris sur la platformo, kiam la sama teruriganta kriego estis denove ripetata, sed tiu ĉi fojo sekvita de alia, pli homa kaj pli natura krio — la ploretado de ĵusnaskita infano!

Ni alproksimiĝis al unu kupeo de kvara klaso, el kiu venis la sono, kaj ekrigardis tra la fenestro. Sur la planko tie interne, en la haladzo-plena atmosfero, kuŝis virino, laŭ elvido pli morta ol viva, vestita en ordinara vesto de rusa vilaĝanino kun sia ruĝa sarafano, kun kap-tuko kaj bastaj ŝuoj. Super ŝin kliniĝis alia virino, tenante en siaj manoj malgrandan korpeton, apenaŭ pli granda ol paro da fortaj man-pugnoj, kiun ŝi ĵus suprenigis en la mizeran lumon de l'vagona lumilo — estis malgranda hom-estaĵo kun kvar ekstremitetoj kiuj baraktis en la aero, kaj kun pulmoj, egale bonaj kiel ĉe ĉiu ajn alia de ĝia aĝo. La pentraĵo vere estis kortuŝanta.

Feliĉe la stacio apartenas al tiuj, en kiuj la fervoja societo subtenas malgrandan malsanulejon kun kuracilejo. Tien nun estis translokita la sceno de l'agado. Du kozakoj portis la duo-



ne senkonscian virinon, alia prenis ŝian apartenaĵon, kaj la nova malgranda mondano estis portata de la bona akuŝistino, kiu per feliĉa okazo alestis.

Ni sidiĝis sur ia benko apude. Iu iris eksenti la pezon de l'bagago, kiun oni metis apud la pordo, kaj esprimis sian miron, ke virino en tiaj cirkonstancoj povis kun si porti tielan pakaĵon. Avano kompreneble tuj ekdiris, ke estus al li malpli komprenebla, se la virino ne naskus infanon — eĉ ne-graveda do povus naski sub tiela portaĵo! — Avano ŝercis kaj ĝojigis ŝercante, kaj ŝajne pro tia kaŭzo li forgesis diri, ke la virino ankoraŭ, krom tio, havis tri malgrandajn infanojn kun si, inter kiuj la plej malgrandan ŝi devis porti sur siaj brakoj!

Dume sin prezentis malfacila demando; la infanon oni devis do tuj bapti, laŭ rusa kutimo, kaj por tio ĉi oni bezonis, interalie, unu "popon" kaj du baptoj. Tiujn ĉi lastajn oni facile trovis — Anna Fedorovna, kiu dumtempe alvenis kun mistera amaso da blanka ŝtofo, — alportita el ŝia hejmo, kaj kun ŝi Sergej Aleksandroviĉ, la kolego de ŝia edzo. Pli malfacile oni trovis popon, sed tamen fine oni ekprosperis eltrovi unu tielan, kiu ronkis en la vestiblo. Li estis, kun iom da malfacileco, vekita, jesigis je la propono plenumi la akton kaj formariĝis en sia longa kaftano kun flirtantaj larĝaj brakingoj kaj pendaĵoj.

Sed li tuj revenis tre ofendita kaj klarigis malkontente, ke kiam ne estis nek libroj nek oleo kaj "ornato", tiam li ne povis nek volis altuŝi la aferon — estis honto nur eĉ proponi ion tielan! Iu kontraŭdiris, ke la infano tamen en ĉia okazo devis esti baptita, kaj ke oni ja devis peni trovi ian eblecon. La popo nur skuis la kapon, tiel ke la longa haro ondiĝis, kaj levis la

ŝultrojn kun mieno, kiu pli klare ol vortoj ekdiris: tre povas esti, sed al mi tio tute ne koncernas!

Tio ĉi cetere estis sufiĉe vera, ĉar li tute ne estis devanta fari bapton, tiel ĉi *à propos* kaj ekster sia komunumo, kaj li do povis, per la kostumo kaj elvido de l'virino, supozi ke tie ĉi li ne povus esperi ian pli vastan rekompencan por la "klopodo". En tio ĉi lasta li tamen iom eraris, sed tion ĉi oni ne povis scii antaŭe. Kaj ĉar la popoj en Rusujo ordinare ne havas konstantan salajron, sed dependas por sia ĉiutaga pano de la donacoj de l'publiko por la servado, komencis tre nature ĉe ili la kutimo rigardi sian servadon kiel tute metian okupadon, kiun oni plenumas kun volonto respondanta al la grandeco de l'atendita rekompenco.

Kelkan horon poste tamen prosperis al unu el la memvo-laj baptoj, al kiuj tiu afero plej proksime apartenis, venigi el ne malproksima preĝejeto la necesajn objektojn, kaj la po-po estis denove alvokita.

Nun nur restis la decido pri la nomo, kaj ĉio estus preta. Ĉar en Rusujo nur estas permesita doni al infanoj tiujn nomojn, kiujn portis la sanktuloj — kaj sanktulinoj — oni ordinare ne longtempe serĉas. Aŭ oni prenas la nomon de la patro aŭ, pli bone, de la avo, aŭ la nomon, kiun tiu tago portas en la almanako. Ĉar tie ĉi la unua ebleco forestis, — neniu do konis eĉ la patron kaj ankoraŭ malpli la avon kaj la dua ebleco ankaŭ prezentis malfacilaĵojn, ĉar oni en la rapideco ne povis trovi la almanakon, proponis Avonov, la princo, tre bonvole ke li mem, kiel sian kontingenton en la armado de l'malgrandulo kontraŭ la malbonaĵoj de l'mondo, donu sian nomon, Dmitrij — kiun malŝparan proponon ĝentile sed decide reĵetis la baptopatro, kiu opiniis ke lia propra nomo, Ser-

gej, estis por tiu celo egale uzebla. Ĉar neniu riskis kontraŭdiri tion ĉi, oni rigardis la aferon kiel deciditan, kaj kiam la etulo en la sama momento estis alportita, komencis tuj la akton.

En la malgranda malsanulejo oni aranĝis sufiĉe bone laŭ la cirkonstancoj. En mezo sur la planko staris provizora baptingo; ĉirkaŭ la supera rando de ĝi estis alpremitaj kelkaj kandeloj, longaj graciaj, brulantaj. La popo apude staris, vestita en arĝent-kudrita, sendube kaj ĉifona kaj malpura, sed en la malforta lumado tamen sufiĉe "prezentebla" kaftano. Sergej Aleksandroviĉ tenis la infaneton, kaj Anna Fedorovna estis preta akcepti ĝin post la akto. La patrino kuŝis, vestita, sur la apuda lito, kun la malgracia, pala vizaĝo kontraŭ la lumo. Mi rigardegis ĝin, sed tiom kiom mi povis vidi, estis rimarkebla en ĝi preskaŭ nenia alia esprimo ol tiu de indiferenteco malinteresita — la sceno estis sendube por ŝi malpli nova kaj malpli interesa ol por mi. Kiel atestaĵo de tio ĉi povis ankaŭ esti kalkulitaj la malgranduloj, kiuj timantaj sidis en ia anguleto. Cetere estis en la ĉambro neniu, krom la akuŝistino kiu enverŝis akvon en la baptingo, unu maljuna duon- an plenblinda maljunulo, kiu reprezentis la ĥoron, kaj mi, kiu venis pro pura scivoleco.

La popo komencis legi, legi per tiu trenanta duon-kantanta tono, kiun mi tiel bone rekonis el la rusaj preĝejoj; estis nur la diferenco, ke tie oni ordinare ne *tiel* rapidiĝas, dume tie ĉi ŝajnis plej grave: en plej mallonga tempo trakuri eble plej grandan parton de *l'ritus*. Iam kaj iam la blinda maljunulo agordis kun sia disrompita voĉo, kriegante iajn *responsoria* (respondaĵojn), kiujn la popo neniam volis aŭdi ĝis fino. Li prenis de Sergej Aleksandroviĉ la infanon, tenis ĝin per siaj

manoj, nudan kaj plendetantan kiel ĝi estis, kaj "orde" dronigis ĝin per la sanktigita akvo, kies sanktecon ankoraŭ grandigis la kandeloj brulantaj. Kiam la malgrandulaĵo ree estis levita el la akvo, denove komencis la maljunulo kun sia disrompita voĉo kelkajn mizerajn kantaĵojn, el kiuj mi nur povis kompreni la ĉiam ripetitajn vortojn: *Hospodi pomiluj — Hospodi pomiluj* — Sinjoro, kompatu! Dio, pardonu!

Kia pentraĵo! La malgranda, seka, blinda maljunulo, kiu kun tremantaj manoj serĉante rampis laŭlonge la muro por ke li venu iom pli proksime, prezentis per sia sulka kvazaŭ velkigita vizaĝo la figuron de homo kiu staras apud la rando de l'tombo. Kaj, aliflanke, tiu ĉi malgranda estaĵo, kiu ĵus eniris sur la saman rigardejon de suferoj kaj pasioj, kiun la alia estis preta forlasi — ankaŭ li, la malgrandulo, blinda, tremanta, malforta kaj sulka kiel malnova vintra pomo — kia similo kaj kia kontrasto!

*Hospodi pomiluj, Hospodi pomiluj* denove kantis la maljunulo. Sinjoro kompatu tielan malgrandulan infanon de l'mizero! En peko kaj manko ci naskiĝis, kaj kiel tie ĉi en nuna momento ne ekzistas eĉ unu sola koro, kiu batas varme por ci kaj cia mizero, ne eĉ la patrina koro, — tiel ci ankaŭ en la vivo renkontos plej ofte nur batojn kaj puŝojn, nur ĉagrenojn kaj dolorojn, kaj, povas esti, ci iros en la tombon ne malpli mizerega ol la maljunulo, kiu kantis ĉe cia bapto. — Sinjoro, kompatu! Jes, povas esti, ci foriros el la mondo, malgrandulo, antaŭ ol ci lernis kio ĝi estas, la mondo, antaŭ ol ci gustis ĉiujn la puŝojn kaj hakojn, atendantaj cin de ĉiuj, kiuj estas pli supraj ol ci aŭ egalaj kun ci — pli malsupre neniu estos, kaj de ĉarmo kaj dolĉeco de l'vivo ci neniam ĝuos ...

*Hospodi pomiluj!* Kaj la malgrandulon envolvis komplate

Anna Fedorovna en la tukoj kaj vindaĵoj, kiujn ŝi kudris por sia propra infano, sed kiujn ŝi kun larmoj formetis, kiam ili nur dum tri semajnoj servis al malgranda, rompema estaĵo, tro malforta por ke ĝi toleru la malvarman spiron de l'morto. Ekestis sekve almenaŭ unu, kiu varme sentis por la malgranda! Ho, ne — nur estis la memoro de propraj ĉagrenoj, kiuj por minuto moligis homan koron! ...

La pastro faris la krucosignon super la baptita kaj tenis al la baptoj krucifikson, por ke ili ĝin kisu. Ili faris tion kun proksimume la sama atento, kun kia oni ĉe ni en Svedujo legas la "manĝopreĝon".


Nun restis nur du aferoj, sed tiom pli gravaj. La ateston de bapto oni devis skribi, kaj la popo devis ricevi la salajron por sia peno. Ne, pardonu, ne en tiu ordo — la plej grava unue, kaj poste la alia! Sekve nur kiam la popo kun granda plezuro metis en la poŝon la bileton de 3 rubloj, kiun donis al li Sergej Aleksandroviĉ — lia baptodonaco al la malgrandulo — nur tiam la popo sidiĝis apud la tablo por ke li donu skriban ateston, ke la malgranda sulka pakaĵo, kiun tenis en siaj brakoj Anna Fedorovna, nun estis orde farita membro de la sankta ortodoksa eklezio. La atesto de bapto — dokumento sufiĉe grava en Rusujo kiel alie — estis skribata per krajono sur la malantaŭa flanko de ia eks-telegramblanketo. Kiam Sergej Aleksandroviĉ proponis al la popo uzi inkon kaj pluĉon, tiu nur rimarkis: "Pli rapide iras en tiu ĉi maniero".

"Pli rapide tiel ĉi" — tio estis la ĉefa enhavo de l'pensoj de l'popo, kiel ĝi sendube ankaŭ estas la parolo de la tuta rusa pastraro. —

Kaj kun tiu ĉi impreso mi forlasis la unuan kaj lastan akton

de baptado, kiun mi ĝis nun vidis en la greka-katolika eklezio.

Apud la pordo staris la maljuna blindulo. Li ricevis dudek kopekojn kaj preĝis Dion, ke Li benu min kaj la infanojn de miaj infanoj. La malgranda blindulo ricevis nenion; kredeble li unu fojon malbenos la homojn.



## Ĉe Lev Tolstoj en Jasnaja Poljana

*Ĉapitro el Till häst genom Ryssland, Stokholmo 1898*

**M**oskvo en julio ne estis por mi pli agrabla ol Peterburgo. Mi vizitis la urbon plurajn fojojn pli frue kaj mi estis revenonta; tial mi decidis resti nur dum kelkaj horoj por ekscii, ĉu Lev Tolstoj estis en sia bieno en Jasnaja Poljana aŭ ne. Mi volis viziti lin tie, por vidi lin en lia ĝusta medio.

Mia plano estis tuj preta; mi prenis izvoŝĉikon kaj veturis tra la longaj kaj mallarĝaj stratoj de "la blanka urbo" rekte al konatulo, pri kies helpo mi kalkulis por mia afero. Bonvenigita laŭ tute tipa rusa gastamo mi trovis mian amikon tuj preta helpi min, kaj baldaŭ mi sidis kune kun li en fiakro survoje al la Tolstoja hejmo.

Kie grafo Tolstoj loĝas en Moskvo? Depost mia unua vizito ĉe li, du jarojn pli frue, mi havis palan memoron, ke devus


esti ie en Zubovo, kvartalo je la alia flanko de la urbo, tute flanke; sed kie en Zubovo, tion mi tute forgesis. Mia amiko havis tamen imagon pri ia Ĥamovniĉeski pereulok, kiu devus esti la ĝusta strato; tien nia izvoŝĉiko ricevis la ordonon veturi.

Post duonhora veturo en polvo kaj varmo tra kurbaj, mallarĝaj, bulŝtonumitaj stratoj, flankumitaj de blankaj domoj kun verdaj tegmentoj kaj tie kaj alie de preĝejo kun orumitaj aŭ arĝentumitaj kupoloj — kaj ni estis tie.

”Gorodovoj — polico! Ĥamovniĉeski pereulok, dom grafa Tolstoja jestj?” ni demandis.

”Jestj” — Estas — estis la lakona respondo, kaj post tio kiel klarigo: — ”la oka domo dekstre, post la granda ruĝa.”

Post kelkaj momentoj ni estas ĉe la oka domo dekstre post la granda ruĝa. Estas simpla duetaĝa ligna domo, sur kies pordolampo estas pentrite per nigraj literoj Domo de grafo L.



La Tolstoja domo en Moskvo



L. Tolstoj. Mia akompananto surpriziĝas pri la komencaj literoj L. L., ĉar la grafo, kiel konate, nomiĝas Lev Nikolajeviĉ; sed mi povis informi lin, ke la granda verkisto en la vero posedas nenion plu, ĉar li fordonis ĉion, kaj ke tiun domon posedas lia filo Lev Lvoviĉ, edziĝinta kun mia samlandanino.

Je nia laŭta vokado aperas la pordisto Nikita; kun sia ruĝa bluzo, tutrusa ĉapo, nigra velura pantalono kaj altaj botoj li estas vera specimeno de honesta moskva dvorniko en bonfar-ta privata domo.

”Grafa doma njetu” — laŭvorte ”de la grafo estas nenio hej-me”, estas lia respondo al nia demando kaj li poste informas nin bonvole, ke la maljuna grafo estas kun sia grafino kaj du el la plej junaj infanoj en Jasnaja Poljana, 15 verstojn for de la urbo Tula, sed nur tri de la stacio Koslovka — kaj ke la juna grafo Lev Lvoviĉ estas en Finnlando aŭ ”ie en tiu direkto”. Per tio li verŝajne celas Svedujon.

Antaŭ ol ni, kontentaj kun la respondo, foriris, mi petis rajti rapide rigardi la ĝardenon. Unue mi miris pri la surprizita mieno de Nikita, kiam li aŭdis mian peton, sed kiam ni envenis la ĝardenon — tiam mi komprenis tion. Ĉar tie vere estis nenio vidinda; nur kelkaj tre malzorgitaj arbustaĉoj. Io tamen estis tie, kio speciale interesis min; mi vidis el la ĝardeno la malgrandan verandon, en kiu mi du jarojn pli frue iun malfrujunian vesperon sidis kun vojaĝkamarado kaj kelkaj adeptoj de Tolstoj, aŭskultante la vortojn de la maljunulo, tiel imponaj en sia klara senvualigo, tiel pruvemaj en senindulga logiko kaj tiel kortuŝaj en la senlima homamo, kiujn ili malkaŝas kaj starigas ŝajne neplenumebajn postulojn. Mi memoris ĝuste tiam, ke ni parolis pri homaj antaŭjuĝoj kaj kion tiu homamiko diris:

”Ni devas fari lokon por la amo al Dio kaj la homoj. Ni devas labori, por ke estu pli da loko ol ni iam esperas, ke ĝi havu — ni devas labori por la idealo, eĉ se ĝi ŝajnas al ni neatingebla. La plej granda malhelpo estas la homaj antaŭjuĝoj — ili devas malaperi. Sed tiom multaj kontraŭbatalas. Estas kiel paralelogramo de fortoj, en kiu ambaŭ komponentoj konsistas el unuflanke egoismo, aliflanke amo al Dio kaj la homoj. Ĉi lasta estas la idealo, utopio, se vi volas, kiun ni neniam sukcesos tute realigi, sed ni devas konstante celi tion, por ke la alia ne fariĝu sole reganta; tiel ni atingos mezan vojon, kiu estos la rezulto de ambaŭ menciitaj fortoj — kaj tio estas ĝuste tio, kion ni povas antaŭvidi kaj esperi de la vivo sur la tero.”

De tiu vizito ĉe Tolstoj mi reiris hejmen kun kelkaj el liaj adeptoj, kaj post kiam ni dum longa promeno en la varmeta somera nokto pludiskutis la vekitajn demandojn, mi sidiĝis ĉe skribtablo kaj ĝis tagiĝo skribis la impresojn de tiu mia unua neforgesebla renkonto kun la eble plej brila kaj certe plej originala el niatempaj filozofoj.

Sed mi revenas al la priskribo de la dua renkonto.

Post mallonga nokta veturo el Moskvo mi alvenis ĝuste je tagiĝo al la urbo Tula; la trajno de tie al Koslovka, la plej proksima stacio suden, de kiu mi devis piede daŭrigi ĝis Jasnaja Poljana, estis forironta pli poste en la mateno, kaj mi decidis uzi tiun tempon por ĵeti rapidan rigardon al la urbo.

Mi eltrovis tre rapide, ke ne povis temi pri alio ol rapida rigardo. Kiel ofte estas en Ruslando, ankaŭ ĉi tie la stacio troviĝas ioman distancon ekster la urbo. Se sankta Stultulo estus vivanta en nia tempo, li sendube mirus, ke la Providenco, kiu en sia saĝeco

— — *”riverojn ĉie metis  
kie grandaj urboj kuŝas — —”*

montris tiel rimarkeblan mankon de antaŭzorgo rilate al fervojoj kaj urboj en Ruslando, ke ĝi igis ilin ”kuŝi” multe tro longe for unu de la alia.

Mi tial devis kontentiĝi rigardi ĝin de malgranda altaĵo ekster la urbo el tiel nomata birdoperspektivo. Tie supre kuŝis malzorgata kaj disfalanta tombejo ĉe malnova preĝejo, kie fenestroj iam estis tutaj; suprengriminte sur ĝian duondisfalantan muron mi vidis sub mi Tulan. Ĉirkaŭata de verdaj ebenaĵoj, kiuj onde etendiĝas ĝis kien la okulo atingas, ĝis la horizonto, kaj tra kiuj la rivero Upa meandras kiel blua rubando, kuŝis tie la larĝa urbo, brila en la plej klara matena lumo. La sunlumo trembrilis en la multnombraj or- kaj arĝentumitaj kupoloj de la preĝejoj — ili estas proksimume 30 —, en la spiroj kaj krucoj, kaj reflektiĝis de la ergverdaj plataj ladtegmentoj de la blankaj domoj. Sur la larĝaj, senfine longaj kaj rektaj stratoj la trafiko ankoraŭ ne sukcesi kirligi la polvonubon, kiu cetere, pli poste en la tago, kovras kiel nebulo ĉiun sud- kaj orientrusan urbon — ĉio daŭre brilis tiel travideble klare, ke ŝajnis ebli vidi la plej etajn detalojn en la dekoracio de la preĝejoj kaj domoj. Sube sur la verda herbejo ekster la urbo paŝtis sin ĉevaloj kaj serĉfosis porkoj; anseroj promenis en longaj vicoj, kun siaj koloj kaj bekoj en la direkto de la vento ili formis, vidite de supre, longajn rektajn blankajn striojn sur la herbejo. Tirbestoj akvumis sin en la rivero; ilin puŝis en la akvon senĉapaj muĵikoj, kies flamruĝaj ĉemizoj akre kontrastis la kolorojn de la akvo kaj herbo; vestaĵoj estis lavataj apude de nudkruraj virinoj kun suprenfal-ditaj jupoj — ilia vigla babilado atingis min sur mia alta ob-

servopunkto en komuna ĥoro kun la same vigla blekado de la anseroj kaj anasoj.

Je la alia flanko de la rivero videblis la akraj linioj de la ruĝaj domoj de la cara fusilfaktorio, kaj pli fore, maldekstre, la blankaj antaŭurboj de Ĉulkova brilis en la verdo simile al poĉitaj ovoj sur telero kun ŝpinaco. Dekstre la urbo grimpis kurage supren sur monteton kaj fiksitis siajn blanke kaj verde koloritajn brakojn ĉirkaŭ ĝia pinto, kiu estis kronita per longaj rektaj muroj de malnova monaĥejo kaj multkoloraj kaj multformaj kupoloj. Sed plej pitoreske, belege kaj brile kuŝis Kreml, la fortikaĵo, konstruita dum la tempo de Jekaterina II kaj enhavanta la plej belajn templojn de Tula, el kiuj speciale unu, Sobor uspenija Bogorodici — Katedralo de la ĉieliro — superas ĉiujn aliaj per siaj imponaj formoj, siaj kupoloj, brilantaj en plej bela ĉielblua koloro kaj oro kaj arĝento, kaj sia grandioza alta turo, ankaŭ ĝi kronita de ora, brilanta, bulboforma kupolo ... Estis pratempa kaj nuntempa Tula samtempe, estis pasinta grandiozo kaj nuna prospero, ĉiuj samtempe antaŭ mi rigardanta tiun urbon, kiu kun sia glora historio kunigas la ŝancon je daŭra prosperado en riĉeco kaj influo. Ĉar Tula estas la ĉefurbo de la samnoma bonfarta gubernio kaj urbo kun preskaŭ cent mil loĝantoj, konata en tuta Ruslando pro sia grandioza metalindustrio; ĝi estas por la rusoj tio kio Eskilstuna estas por svedoj.

Mi grimpis suben de la muro kaj promenis inter la sovaĝiĝintaj betuloj kaj kverkoj de la tombejo. Iu kuŝis tie ĉe la preĝeja muro. Mi proksimiĝis. Amaso da ĉifonaĵoj, disŝiritaj flikaĵoj — io kaj kolore kaj forme nepriskribebbla, nedifinebla. Nun ĝi moviĝas, krampe, spasme. Kio estas tio? El la ĉifamaso elvenas mano, brako — ho, estas nur dormanta viro, kiu ĉa-

sas iom tro obstinajn ĝenulojn. Kun peno mi distingas ankaŭ paron da kruroj kaj piedoj, vinditaj per malpuraj linĉifonoj, ligitaj per bastobendo. Sed kio nun — la tiritan manon, kiu estis dekstra, sekvas alia mano, ankaŭ dekstra! Mi ne scias, kion pensi, antaŭ ol mi konscias, ke sub ĉiuj ĉifonoj kaŝigas



ankaŭ alia figuro — virino. Ho ve, estas paro de mizeruloj de ĉi tiu socio, parioj, kiuj rondiras sen favoro kaj sen protekto, kiuj malhavas hejmon kaj estas pli malriĉaj ol birdoj en siaj nestoj, ĉar ili ne havas ion, al kio apogi sian kapon. Duonnudaj en siaj ĉifonoj ili sin ĵetis ĉi tie sur la deklivon por tranokti; kie ili kuŝas kaj dormas, videblas iliaj maldikaj korpoj tra la mizeraj vestaĵoj. Miriadoj da neinvititaj gastoj konstante ĝenas ilian dormon, sed nur la pli kaj pli varmigantaj sunradioj kaj eble ankaŭ la senkonscia sento, ke iu rigardas ilin, vekas la viron; li duonrektigas sin, rigardas min, frotas siajn okulojn kaj rerigardas min — komence iom timigite, poste nur scivoleme — li tuj vidas, ke mi ne estas malbonema. Per malmilda bato li vekas la virinon, kiu levas sin sur la kubuton fiks-

rigardante la sunon. Kiam mi vidas ilin ambaŭ unu apud la alia, tiuj plej mizeraj inter mizeruloj, la plej forpuŝitaj kaj plej aĉaj, dividante sorton pli malbonan ol la plej malbona, mia koro pleniĝas per tiel senlima kompatato, ke mi sentas, ke mi volas doni ĉion, kion mi posedas kaj post tio mian vivon por aranĝi por ili kaj kelkaj el iliaj miloj kaj miloj da similuloj iom pli bonan kaj feliĉan vivon. Sed mi ne donis al ili ĉion, kion mi posedas, nek mian vivon, sed entute dudek kopekojn por tabako, kiam la viro petis de mi cigaredon. Li gapis al mi mirigita. Sed mi iris de tie kun doloro kaj amaro en la koro.

Tiel ni ĉiam faras, ni "altklasuloj" — ni fieras pri niaj sentoj, kiuj eble laŭ boneco, forto kaj nobleco multoble superas tiujn, kiuj ekbrulas en koroj, kiuj batas sub laborista jako, ŝafa peltmantelo de muĵiko aŭ trikita torsvesto de kamparanino. En tio ni certe pravas, ĉar ĉe ni tiuj sentoj estas multe pli fajnaj, delikataj, komplikaj kaj intensaj, ĉar tio apartenas al la kultura vivo. Sed al kio utilas tio, se la rezulto estas tiel malgranda — por la mizerulo arĝenta monero kaj por ni mem momento da malagraba kaj doloriga percepto, ke io estas erara kaj ke io, malcerte kio, farendas — percepto, kiun forĉasas la unua varmeta somervento, kanto de alaŭdo, interesa libro, agraba interparolo aŭ — bona tagmanĝo!

Spontanee mi memoris, kiam mi malrapide reiris al la stacio, kion Tolstoj en unu el siaj libroj skribas pri almozo. Li promenis foje kun sia servisto sur moskva strato, kiam ili renkontis almozulon, kiu petis almozon — *radi Ĥrista* "pro Kristo". Tolstoj haltis kaj donis el sia monujo du arĝentajn monerojn kun la valoro de tridek kopekoj al la almozulo, kiu surprizita pro la malavara donaco plenigis lian manon per kisoj kaj petis Dion beni la bonan donanton kaj ĉiujn liajn nepojn.

Samtempe la servisto etendis malpuran kupran moneron kaj diris al la almozulo: "redonu du kopekojn, ĉar mi volas doni al vi tri, sed havas nur kvinkopekon." La almozulo faris laŭ peto kaj Dmitri, aŭ kio estis lia nomo, enpoŝigis silente la du kopekojn. Tolstoj surpriziĝis, ke la almozulo dankis pro la tri kopekoj same humile, kiel li dankis lin pro la tridek, kaj ridis pri la komikeco en almozo-redono. Sed poste li ekpensis ke Dmitri, doninte tri kopekojn, en la vero donis multe pli ol lia sinjoro, kiu donis tridek, en rilato al siaj enspezoj; Dmitri tial pli meritis la dankon ol li mem. Kaj li estis tiel kontenta pri sia donaco kaj kredis, ke li faris laŭdindan agon! Nun li komprenis, ke ĝi eĉ ne estis same valora, kiel kiam lia servisto donis al la mizerulo duonon de malgranda ŝanĝmonero!



Tiel ŝrumpas la homaj agoj, kiam oni metas ilin en la ĝustajn proporciojn aŭ, kiel diras Spinoza, kontrolas ilin en la lumo de eterneco.

\* \* \*

Duonhoron pli poste mi subeniris de la trajno en la stacio de Koslovka.

La vojo al Jasnaja Poljana iris tra agrabla arbara parko kun

grandegaj foliarboj kaj tie kaj alie dismetitaj pinoj, tute rekta kaj tiel larĝa, kiel se ĝi estis intencita por tuta armeo. Post dudekminuta promeno mi atingis la finon de la arbaro kaj sidiĝis por momento en ombro de grandega betulo por legi kelkajn paĝojn el la interesa libro de Stadtling, "La religiaj movadoj en Ruslando", la sola pakaĵo, kiun mi ĝuste tiam kunportis, kun la escepto de miaj tualetaĵoj; estis ankoraŭ frue en la mateno kaj mi ne volis veni tro frue al Jasnaja Poljana. La birdoj pepis gaje kaj la vento susuris malforte en la arbopintoj, dum mi legis pri karceroj kaj morto kaj persekutoj, pri firmega kredo kaj heroeco kaj memoferoj.

— — — — —

Jam estis pli malfrue en la tago. La suno staris pli alte, la birdokantoj iom post iom ĉesiĝis, la vento ne plu susuris, sed la insektoj sur la tero zumis, saltis, kuris kaj rapidis tien kaj reen en la varma sablo ĉe miaj piedoj, pli kaj pli vigle. Mi leviĝis kaj daŭrigis mian promenon.

Mian vojon krucigis la granda ŝoseo, kiu iras de Tula suden al Voroneĵ. Tie mi renkontis rusan pastron veturanta kun sia familio. Ĝentile, sed ne sen ioma ironio, mi demandis lin pri la vojo al la domo de Lev Tolstoj.

"*Vot tam Jasnaja Poljana,*" li respondis ĝentile kaj montris al arbokovrita altaĵo en la proksimeco. "Tie ĝi estas," kaj li aldonis plurajn informojn pri la mallonga vojpeco, kiu restis.


Mi dankis, levis mian svedan studentan ĉapon pli alten ol mi iam antaŭe faris por rusa ortodoksa pastro, kaj daŭrigis. Unue preter agrabla pinarbareto kaj malnova memorŝtono kun ĉizelitaj blazonoj — tio estis limmarko inter Jasnaja Pol-



jana kaj la najbaroj — poste sur malgranda ponto kaj preter vasta fruktĝardeno kun disfalanta pavilono sur monteto en angulo. Baldaŭ mi staris ĉe du grandegaj muritaj kolonoj de latispordo, el kiuj unu enhavis ĉambron, kiu evidente estis uzata kiel kokinejo. Maldekstre kuŝis la vilaĝo Jasnaja Poljana, ordinara rusa vilaĝo kun malgrandaj grizaj dometoj el ligno aŭ argilo; rekte antaŭen estis longa aleo de altaj poploj kaj aceroj, dekstre la fruktoĝardeno kaj duonsovaĝiĝinta parko, kiu etendiĝis je ambaŭ flankoj de la impona kaj pli frue certe bone prizorgata aleo.

Mi iris malrapide sur ĝi, scivolema kiel oni akceptos min, ĉar mi venis tute neinvitita, sen rekomendoj kaj nur kun referenco al rapidaj konatiĝoj dum mia pli frua vizito.

Je la fino de la aleo mi trovis tenisejon, evidente ofte uzatan, poste iom "sovaĝan" ĝardenon, kaj post ĝi la simplan blankan duetaĝan domon, kie Lev Tolstoj loĝas somere kun sia familio. Sur la balkono en la supra etaĝo aperis longa, mal-dika figuro kun larĝaj, rektaj ŝultroj kaj ondiĝanta longa, griza



Jasnaja Poljana

barbo — estis la maljuna grafo mem, faranta sian matenan gimnastikon en la sunlumo.

Ĉe la matenmanĝa tablo, kiu estis pretigita en la korto sub grandega arbo, mi trovis junan viron, kiu prezentis sin kiel kamarado de la plej juna filo de Tolstoj. Mi donis al li mian vizitkarton, sur kiun mi, por pli bona efiko, skribis en la internacia lingvo Esperanto: *Amiko de Tregubov kaj Puĉkovski*, du sindonemaj adeptoj de Tolstoj, kiuj en la antaŭa okazo prezentis min al la grafo.

Post kelkaj momentoj mi havis la plezuron vidi la grandiozan, de jaroj ankoraŭ ne kurbitan figuron renkonti min ĉe la pordo. Li akceptis min kun afabla kaj natura amikeco kaj certigis ĝentile, ke li bone memoras mian antaŭan viziton ĉe li en Moskvo. Antaŭ ol mi povis diri ion plian, li demandis min, ĉu mi volas partopreni lian rutinan matenbanon; nur nun mi rimarkis lian kostumon, kiu estis strangaspekta ankaŭ por tiu, kiu bone konis liajn simplajn kutimojn — ĝi nome konsistis el nenio alia ol paro da simplaj pantofloj kaj tualetrobo el maldika blua ŝtofo, tenata kune ĉe la zono per bantuko! Mi apenaŭ sukcesis pripensi la kuriozan bonvenigon, kiam mi jam estis ĉe la grafa banejo — lageto en la parko, plenkovrita per "akvotrifolio".

La "bandomo" estis plej eble primitiva, konstruita el maldikaj vergetoj kaj kanoj, kaj havis lokon por maksimume du aŭ tri personoj samtempe. La tualetado ne kaŭzis al mi pli da laboro ol al la grafo, ĉar mi intence vestis min tre simple, kaj baldaŭ ni ambaŭ plaŭdadis plenplezure inter la verdaj kreskaĵoj en la lageto, naĝante, snufegante kaj baraktante en la cetere relative klara akvo, gajaj kiel knaboj, kiuj forkuris de sia instruisto. Kiam la maljuna grafo leviĝis el la akvo kun la ha-



raro kaj barbo plenaj de la verda akvotrifolio, li aspektis kiel maljuna akravida sed bonvolema Neptuno, kiu dum momento estis tentata junece ruli sin en sia propra elemento. Li ĝojis pro mia naĝado kaj volis poste, kiam mi elvenis el la akvo, ke mi montru ekzemplon de nia konata sveda gimnastiko, kion mi volonte faris, kontenta, ke mi dank'al la maljuna kapitano L. en Upsalo ne bezonis hontigi mian nacion en tiu rilato. Li volis tiam montri, ke liaj brakoj malgraŭ la sepdek jaroj ne

perdis sian viklecon — kun la rezulto, ke li preskaŭ faligis la malstabilan bankabanon!

Dum la promeno reen al la domo kaj dum ni kune kafumis ĉe la tablo sub la granda arbo, mi apenaŭ povis imagi, ke tiu fortika, sana, gaja kaj ŝercema maljunulo, kiu nun estis antaŭ mi, povas esti la sama fervora, pasia, serioza moralapostolo kaj sama senindulge severa filozofa Tolstoj, kiun mi ekkonis en *Konfesoj* kaj *Kio estas faren-da?*

Kiam ni fintrinkis la kafon, la gastiganto sciigis, ke li estas ĝuste nun plene okupita per interesa verko *Pri la belartoj* kaj ke li dum sia plej bona labor-tempo, inter la 10-a kaj 2-a, lasas sin ĝeni nek de reĝoj nek de almozuloj. "Cetere," li aldonis kun ĝentila rideto, "vi devas esti laca post via promeno kaj



Lev Tolstoj

la bano; mi petos, ke oni preparu por vi sofion en la malvarmeta pavilono. Post kiam vi dormis kiom longe vi deziras, vi povas promeni en la parko kun iu el la junuloj ĝis la 2-a horo, kiam ni tagmanĝos — poste ni povos paroli. Kaj ĝis tiam *Gute Nacht!*" li finis ridetante kaj iris.

— — — — —

La tagmanĝo pasis.

Ĝi daŭris longe — pli longe ol mi kredis de li, kiu laŭ la onidiroj prenis la kutimojn de la rusa kamparano kiel mode-

lon. Kvar manĝoplandoj kaj du servistoj por la servado — mi atente rigardis la grafon por vidi, kiel li reagis al tio. — Li tute ne "reagis", li sidis tutsimple kaj manĝis sian simplan verdsupon kaj alian manĝon, ankaŭ preparita el ĝardenaj produktoj — li estis vegetarano dum dek jaroj sen ke li, laŭ propra eldiro almenaŭ, fartu alimaniere ol bone. La multaj manĝoplandoj estis por la gastoj kaj la familio, kiu vivas laŭ la kutima vivmaniero de rusa nobela familio, eĉ se iom simpla.

Sed mi forgesis prezenti la familion — aŭ pli ekzakte ĝiajn ĉeestantajn membrojn.

Unue estis tie la grafino. Sofia, grafino Tolstoj, apartenas al nenobela germana familio, kiu longe loĝis en Ruslando; ŝi tial sentas kaj pensas kiel vera rusino. La loko, kiun ŝi havas kiel edzino de la plej granda verkisto de sia lando kaj niatempa plej fama personeco, ŝi certe pli bone plenumas ol iu alia. Kun speciala talento ŝi kunigas kaj plej eminentajn konojn kaj nekredblan laborkapablon. Ŝia pozicio ankaŭ ne permesas mallaborem, speciale pensante, ke ŝi interalie dum jardekoj funkciis kiel la sola sekretario de sia edzo. Kaj kion tio signifas komprenas nur tiu, kiu vidis la skribstilon de Tolstoj kaj konas lian manieron prilabori siajn manuskriptojn; kiam netskribitaj li korektas ilin sur preskaŭ ĉiu linio, ŝanĝas, forstrekas kaj reskribas; poste ili devas esti denove netskribitaj, denove korektitaj kaj tiel plu senfine. Kaj tiun laboron faris grafino Sofia. Oni asertas, certigante la veron, ke ŝi devis reskribi kelkajn el la verkoj de Tolstoj ne malpli ol dek kvin aŭ dek ses fojojn. Nun ŝi estas liberigita de tiu tasko, la grafo nome havigis tajpilon, sur kiu speciale dungita persono kopias la manuskriptojn. Ĉe la lasta nettajpado la maŝino liveras ses kopiojn en unu fojo, kio ebligas, ke la verkoj de Tol-



Grafo kaj grafino Tolstoj


stoj povas aperi samtempe en rajtigitaj tradukoj en pluraj lingvoj. Oni vidas, ke la granda maljunulo, kun ĉiu sia malŝato de artoj kaj sciencoj ne malakceptas iliajn fruktojn.

Grafino Tolstoj montras sin iom nervoza, pro kio oni komence ne tre bone fartas kune kun ŝi, sed ankaŭ post relative malprofunda konatiĝo oni lernas taksu nekutime edukitan, inteligentan kaj noblan personecon. Ŝi neniam, kiel ankaŭ ne la ceteraj membroj de la familio, plene dividis la opiniojn de sia edzo dum la lasta fazo de lia vivo, eĉ se ŝi en multaj kazoj simpatias al ili. Ŝia pozicio pro tio fariĝis tre malfacila, kaj estas rimarkeble, ke nur virino kun speciala inteligenteco, takto kaj juĝokapablo povis elteni ĝin kiel ŝi faris. Ĉiuj ŝiaj infanoj ricevis la plej zorgoplenan edukon; la patro, tiel dirite, partoprenis en tio nur pasive. Ŝi prizorgis kaj daŭre prizorgas la eldonadon de la verkoj de sia edzo — Tolstoj ŝajnas nuntempe tute indiferenta al ĉiuj tiuj romanoj kaj rakontoj, kiujn la mondo admiras, kaj li faras nenion por ili. Ŝi havas grandan influon al la verkado de Tolstoj, nun eble malpli ol pli frue, ĉar ŝia prijuĝo ofte estis decida; estas, ekzemple, ŝia merito ke *Paco kaj milito*, la fama granda romano en kvar partoj, estis purigita de pluraj teruraj detaloj, krudaĵoj metitaj en la buŝojn de la personoj kaj scenoj, kiuj malfaciligus la ĝuadon de tiu verko ĉe bonkoraj homoj. "Mi mem ne legus la verkon," grafino T. diris foje al mi, "sen faligi larmoj pro doloro, indigno kaj humiligo flanke de mia sekso, kaj mi scias, ke neniun purkora virino povus fari tion; kial do ekskludi ĉiujn tiajn de ĝuado de verko tiel rava, tiel grandioza, tiel fiera kiel ĝi?" Tiam Tolstoj sekvis la konsilon de la edzino, sed alian fojon lasis ĝin sen konsidero — tiam estis kreita *Kreutzerŝonato*. "Mi neniam komplete legis tiun libron," la grafino diris

dum konversacio, "kaj mi malamas ĝin; mi ne volas enmanigi ĝin al iu, kiun mi amas."

Tolstoj, en sia tutrusa, iom naiva senpripenco, ofte faras promesojn iudirekten, sen konsideri iliajn enhavon kaj eventualajn konsekvencojn. Jen kaj jen li pro sia afabla komplezemo al fremduloj, kiuj ne ĉiam uzas tion diskrete kaj takte, venis en malplezurajn situaciojn, kiuj solviĝis nur pro la saĝa kaj energia interveno de lia edzino. Pri unu tia okazaĵo oni iam rakontis al mi en la tolstoja hejmo tiamaniere.


T. skribis artikolon pri temo, kiu igis lin akre ataki plurajn aŭtoritatojn, instituciojn kaj cirkonstancojn en Ruslando. Kontraŭkute la manuskripto ne trapasis la "hejman" cenzuron, antaŭ ol ĝi estis sendita por preso en renoma rusa revuo, sed la redaktoro de tiu revuo, saĝa homo kaj persona



Jasnaja Poljana, el la ĝardeno



amiko de Tolstoj, laŭ propra iniciato entreprenis plurajn forstrekojn en ties intereso, pri kio la aŭtoro post pli posta ripenso sentis sin sufiĉe kontenta. Dumtempe juna anglo, ni nomu lin sinjoro C., iom malmodesta kaj tromemfida persono, sukcesis en nekonata maniero — supozeble per la preseja personaro — havigi al si la originalan manuskripton kaj baldaŭ li publikigis en anglaj gazetoj iom torditan kaj akritigan tradukon de la jam akra originalo. Ĝi vekis grandan atenton; la caro mem kaj kelkaj ministroj publike eldiris sian miron kaj bedaŭron kaj riproĉis akre — kaj prave — kaj la tonon kaj la enhavon de la studo. La anglo, kiu embarasiĝis, tuj veturis al Jasnaja Poljana kun skribaĵo, kiu laŭ lia propra informo al Tolstoj nur enhavis kelkajn ĝentilajn vortojn pri li mem kaj lia agado, kaj postulis la subskribon de la grafo por poste publikigi la skribaĵon. Tolstoj en sia sensuspektema fido pretis jam skribi



sian nomon sur ĝin, kiam la grafino envenis kaj petis, ke ŝi almenaŭ rajtu rigardi la paperon, antaŭ ol ĝi estos subskribita. La anglo fariĝis konfuzita kaj ekskuzis sin, ke la tempo ne permesas tian tralegon, ke li devas kapti trajnon k. t. p. La grafino klarigis same trankvile kaj tute ĝentile, ke li estos bonvena gasto en la domo por kiom ajn longa tempo, sed la skribaĵon ŝi *nepre* legos.

Ŝi ankaŭ legis ĝin — kaj disŝiris ĝin en pecojn antaŭ liaj okuloj! Ĝi nome enhavis, apud pluraj superlativaj vortoj pri

sinjoro C., plenan certigon de Tolstoj, ke la traduko en la angla gazeto esprimas plej fidele kaj kontentige liajn pensojn pri tiu demando! — "Se tiu skribaĵo estus publikigita," la grafino diris al mi, "la reputacio de mia edzo estus ricevinta fortan baton; lin mem fakte tio ne ĝenas, sed tio ĝenas aliajn. — La anglo ne estis tre kontenta pri mi, kiam li forveturis," ŝi aldonis kun bela rideto.

Tiamaniere la edzino de Tolstoj multajn fojojn intervenis, ĉar lia intensemo unuflanke kaj lia trofidemo aliflanke kutimis meti lin en ĉagrenajn malfacilaĵojn. Laŭ ŝi mem ŝia influo en tio nuntempe estas minimuma, sed je almenaŭ unu okazo mi havis la ĝuon konstati la kontraŭon. Tolstoj montris al mi je unu okazo manuskripton de gazetartikolo, dirante, ke li volonte estus publikiginta ĝin, sed ne faris tion kaj metis ĝin flanken, ĉar la edzino malkonsilis. La grafino estis tiam forvojaĝinta, sed kiam ŝi kelkajn tagojn poste revenis el Moskvo, li venis al mi kaj diris, duonŝerce duonserioze. "Ŝi cedis nun — mi *rajtas* publikigi ĝin! — Nu ja, mi estus tamen farinta tion," li rapide aldonis, "se mi opinius tion korekta, sed estus ĉiam malplezura." Supozeble li timis, ke oni kredos, ke li estas sub la ŝuo de sia edzino. Tolstoj sub la ŝuo — tiu penso estas komika por ĉiu, kiu iom konas liajn verkojn kaj personecon.

Ĉar la grafino sidis vidalvide al mi ĉe la tablo sub la granda arbo en la korto, kie la tagmanĝo estis servata, mi havis bonan okazon observi ŝin. La alta, iom mallarĝa frunto, la grandaj, brunaj okuloj kun la rapida rigardo kaj cetere la tuta karaktero de la vizaĝo donas al ŝia personeco klaran esprimon de inteligenta forto, kiu mildiĝas iomete de, se mi rajtas tion diri, la "ĝentilaj" manoj kaj ioma plaĉa diketeco. La ra-

pidaj, iom nervemaj movoj ŝajnis malkaŝi pro troa psika laboro iom trosteĉitan fizikon — opinio, kiu pli poste malpraviĝis. La grafino parolis rapide kaj plurajn lingvojn — jen ruse kun la filo Miŝa (Miĥail) kaj lia instruisto, Basinov-speca, kiel leganto de Turgenjev tuj rekonus — jen france kun mi kaj la 14-jara filino Saŝa (Aleksandra) kaj ŝia franca guvernistino — jen angle kun la alia guvernistino. Ĉar krom tio la grafo parolis germane kun mi, fariĝis iaspeca malgranda babelakonfuzo, kiu je unu okazo igis Tolstojon ekkrii: "Se ni ĉiuj, kiel nia gasto ĉi tie, farus al ni la peneton lerni kaj paroli Esperanton, tiam la tuto estus multe pli komforta!"

[ ... ]

### ***El Till häst genom Ryssland***

*Tradukis Franko Luin*

[www.omnibus.se/inko](http://www.omnibus.se/inko)

**ISBN 91-7303-073-2**